

Nia Gazeto

Direktoro: Georges AVRIL

MONATA ELDONO DE « L'ÉCLAIREUR DE NICE ET DU SUD-EST »

Cefredaktoro: S. GRENKAMP-KORNFELD

Cekuntaborantoj: Prof. W.E. COLLINSON (Britujo). — C. AYMONIER; d-ro BRIQUET; d-ro CORRET; prof. COTTON, membro de l'Instituto; prof. DEJEAN; ERA; L. LEONTIN; prof. VANVERTS (Francujo). — JAUME GRAU CASAS (Hispanujo). — JULIO BAGHY (Hungario). — CAN-SO-LIN (Ĉinujo). — Prof. Bruno MIGLIORINI; d-ro Elio MIGLIORINI (Italujo). — I. ROTKVIC (Jugoslavio). — F. LIDIA ZAMENHOF; prof. d-ro O. BUJWID; I. LEJZEROWICZ; F. A. FRENDEL (Polujo). — Prof. P. BOVET (Svisujo)

REDAKCIO
ADMINISTRACIO
NICE (Francujo)
29, Avenue de la Victoire

Jarabono: Francujo, frfk 10 (svfk 2); landoj aliĝintaj al la konvencio de Stockholm, frfk 12 (svfk 2,40); aliaj landoj, frfk 15 (svfk 3).

Anoncoj: unucentimetra kolonero (67 m/m larĝa) kostas frfk 5 (svfk 1). Anoncoj pri korespondado, intersaĝo, ktp. kostas frfk 2,50 (svfk 0,50) por tri linioj. Poŝteka konto: Marseille n° 262-74, Eclairer.

Pli rapide, Billy...

En la vagonaro, kiu kondukas min hejmen L.e. Parizon, post pli ol dumpnata vojaĝo, mi legas, ke la plej granda kaj plej riĉa angla aŭtomobil-konstruisto, l'ordo Nuffield, festis sian 57-an datrevenon. L'ordo Nuffield ne ĉiam estis l'ordo.

Li iam nomiĝis simple kaj ordinare: William Morris.

Sian eksterordinaran karieron li komencis kiel profesia biciklisto. Li partoprenis preskaŭ ĉiujn britajn vetkurojn en la jaroj de 1893 ĝis 1900 sur bicikloj kaj bicikloj de sia konstruo.

Oni tiam povis aŭdi ofte sur la britaj vojoj la kuraĝigajn kriojn: Pli rapide, Billy... pli rapide!... pli bone!...

Hodiaŭ, kiam tian nomon ornamas estimata titolo, l'ordo Nuffield vetkurigas nur siajn aŭtomobilojn. Finiĝis la tempoj, kiam Billy devis bone pedali por perĝajni kelkajn sterlingajn funtojn...

Ce tia 57-jara datreveno oni oferis al li multajn donacojn. Inter aliaj oni donis al li biciklon.

Kiam l'ordo Nuffield ekvidis la biciklon li prenis ĝin, eksidis ĝin kaj ekpedalis. Oni diras, ke li atingis rapidecon pri kia povus fieri ĉe junaj ĉampionoj.

Kaj li estis fiera, kiel neniam antaŭe, pro la aklamoj de siaj gastoj.

Dum la festeno, kiu l'ordo organizis por siaj gastoj, oni multe paroladis. Ne nur dum esperantistaj festoj oni amas paroli.

La jubileo alvokis (kompreneble!) al aĉetado de nur anglaj aŭtomobiloj, kaj al la deputitoj li minacis per la kolero de l'epopolo, se ili aĉetados eksterlandajn aŭtomobilojn.

Unuvorte la datreveno festeno de la plej granda angla aŭtomobil-fabrikisto estis plena de sentimontoj kaj de — komercaj sentoj... por de li mem fabrikata komercaĵo!

Tiamaniere la festenaj elspezoj por la invititaj gastoj estis kovritaj kaj enkalkulitaj sur la konto de la komerca reklamo de la aŭtomobiloj Morris.

La reklamo estas la bazo de la komerca...

En Esperantujo ni ankaŭ dum la lastaj dek jaroj havis belajn kaj originalajn jubileajn festenojn.

Diversaj «kompetentaj» (kompreneble!) delegitoj vetkuradis al Genevo, festenis en diversaj «kontrolaj komisionoj», kaj trovadis ĉion «en la bona ordo»!...

Kaj subite nur en Stokholmo la novelektito, ofte en la samaj personoj, eksciis surprize ke la «reklamo» kapitalo Hodler estas for... elspezita en nebona maniero.

Ni esperas, ke niaj novaj malnovaj delegitoj, kiuj senpripense ĉion antaŭe trovis en ordo, bazos siajn estontajn laborojn iam pli serioze ol antaŭe.

La komerca inteligenteco de l'ordo Nuffield estu por ili — bona ekzemplo.

Ili ekpedatu pli rapide kaj ankaŭ pli honeste kaj pli serioze en la kontrolado, ol tio okazis antaŭe.

Tiam ili ne havos la surprizon kaj ne ekscios du tagojn antaŭ fermo de Universala Kongreso, ke granda kapitalo estas for, pri kio ili devis seti detale jam de multaj jaroj.

S. G.


Th.-A.M. STAUNING

Eminenta Dana Ministro parolas pri la Ekonomio kaj la Krizo

Dum nia vojaĝo al la Stokholma Kongreso ni havis la grandan honoron esti akceptita de la eminenta dana Statministro, s-ro Th. A.M. Stauning, kiu malgraŭ sia granda okupo, konsentis al intervjuo...

La kariero de ministro Stauning, kiu hodiaŭ kiel hieraŭ ludas tre gravan rolon en la malgranda Danujo, estas eksterordinara.

Kiel dekjara knabo (li naskiĝis la 26/10 1873) li estis pakajportisto. Poste li studas la metion de cigarsortimentisto. Li baldaŭ distingigas inter siaj kamaradoj kaj de 1896 ĝis 1908 li estas prezidanto de la Asocio de danaj cigarsortimentistoj. Fariĝas redaktoro de la faka laborista organo.



Poste kunlaboranto de la grava (nun registara) ĵurnalo «Socialdemokraten». Li estas elektita (en 1898) kasisto de la Socialdemokrata Asocio.

Merkante eksterordinarajn organizajn kapablojn li fariĝas la animo de la Asocio. Li estis elektita ĝia prezidanto en 1900, kiel jam trijara deputito.

Pro siaj kapabloj, optimisma kaj krea energio, li gajnas la fidon ne nur de la popolo, sed ankaŭ de siaj deputitaj kolegoj.

Li akiras fortan pozicion en la socialdemokrata partio.

Ludas tre gravan rolon en la proksimigo kaj kunlaboro de la socialista kaj socialdemokrata partioj.

Kaj neforgesebla estas lia influo dum la milito tiel en la interna kiel en la ekstera klopodado por la paco.

La laborista klaso ne povas forgesi liajn grandajn zorgojn kaj klopodojn por la plibonigo de la laboristaj kondiĉoj.

Estas ministro Stauning, kiu enkondukis la senlaborulan leĝon kaj la okhoran labortagon.

Plurfoje ministroprezidanto, s-ro Stauning estas sendube la plej elstara politika persono de Danujo.

Impona, sed tre agrabla estas la vizaĝo

de Stauning; la longa griz-blanka barbo kaŝas la energian esprimon de la vizaĝo donante al ĝi avan dolĉecon.

Estas granda plezuro por ni povi publikigi en nia gazeto liajn ne tro optimistajn por hodiaŭ, sed tamen ĉiam sobrajn kaj klarvidajn opiniojn.

S-ro ministro Stauning ne havas multe da tempo, tial rapide oni devas demandi por elprofiti la disponeblan kvaronhoron.

Al nia demando, kiel nun aspektas la situacio en Danujo, li respondas:

«La ĝenerala krizo alportis tre maldubigablan influon por Danujo. Antaŭ kelkaj jaroj la agrikultura eksporto estis de ĉ. 1.400 milionoj de danaj kronoj, kaj nun la eksporto falis al 800 milionoj. Tio okazis ne nur pro maldatiĝo de la prezoj, sed ankaŭ pro malgrandigo de la eksporto.

Kresko de senlaboreco kaj pagomalfaciloj inter la kamparanoj estis la konsekvenco de tiu situacio.

«Ankaŭ la brita valuta skuo estis maldubigabla por ni. Ni devis sekvi la britan valutan politikon, ĉar nia dana eksporto dependas ĉefe de Britujo.

«La en multajn landojn enkondukita dogana kaj importa politiko, devigis ankaŭ nin al pli rezona ekonomia politiko.

Ni ankaŭ devis klopodi por memsufiĉa prizorgo. Nia eksporto ne plu permesis, ke ni importu je ĉ. 1.700 milionoj, kiel okazis antaŭe.

«Cu la postulo de la komerca eksporta kaj importa egaligo alportas ion bonan?

«Kompreneble, ke ĝi estas bedaŭrinda afero.

«Mi ne opinias, ke limigo de libera komerco estas sana, sed mi opinias, ke ankoraŭ longe ni estos elmetitaj al tia arbitro.

«Cu lastatempe la cirkonstancoj plibonigiĝis?

«Jes, ili plibonigiĝis. La reguligado de la produktado kaj certaj antaŭzorgoj kaj aplikitaj rimedoj por la disvolvado de la interna debito, kontraŭkriiziloj: alpagaj premioj por la eksporta varo, impost-faciligoj, procentmalaltiĝo ktp. — plibonigis la situacion sur la kamparo kaj malgrandigis la senlaborecon.

«Hodiaŭ nur 12 % de la kontraŭ senlaboreco asekuritaj laboristoj senlaboras.

«Cu en Danujo regas kontento?

«Ekzistas, kompreneble, multaj, kiuj havas la kialon por esti malkontentaj, sed regas ĉe ni forta volo la kialojn de l'malkontento forigi.

«Tial mi povas diri, ke ĝenerale regas kontento.

«La dana popolo estas demokrata kaj ĝi esperas daŭrigi sian disvolvon laŭ tiu direkto, kiu montriĝis la ĝusta por nia lando.

«Kaj la situacio en la mondo?

«Mi ne sentas min kompetenta priĵugi la situacion. Ĉio antaŭdiras pluan malkvieton. La atendita paco post la granda mondmilito ne alvenis. La aventuroj de l'hodiaŭo povas multobligi la malkvieton kaj malfortigi la produktajn fortojn.

«La dana popolo havas neniajn altflugajn planojn aŭ dezirojn. Ni deziras vivi paco kun la najbaroj kaj aliaj popoloj. Ni

Flugfolioj

Kiam mi min trovas en publika loko, en kafejo, en vagono aŭ aliloke, min plezurigas aŭskulti la konversacion de la najbaroj.

Ili parolas pri la plej diversaj temoj, pri amo, pri mono, pri religio, pri politiko, pri paco, pri milito, pri komerco, pri industrio, pri familioj, naciaj aŭ internaciaj aferoj; sed neniam kaj nenie vi aŭdas samnaciajn parolantojn pri sia lingvo.

Cu tial, ĉar ili opinias ĝin plene logika, senmanka, senerara? Tute ne! Sed ili uzas ĝin tia, kia ĝi estas, ĉar ili scias, ke se ili ĝin sangus aŭ plibonigus ĉe la plej malmulte, ili ĉesus tiufakte paroli korekte sian lingvon. Ili do konversacias per ĝi, ne pri ĝi.

Male, aŭdu pri kio parolas du okaze renkontigitaj esperantistoj: pri la lingvo, nur pri la lingvo, ĉiam pri la lingvo.

Ili ja laŭte distumpetas, ke ĝi estas simpla, facila, helsona, vere internacia en siaj elementoj; ke ĝi plene solvas la problemon de helpe lingvo tutmonda; ke Zamenhof estis geniulo kaj ke prave diversaj urboj donas tian nomon al unu el siaj stratoj. Sed private ili ĝin senĉese kritikas.

Ciun vorton ili traesploras, sekcas, disartikigas; ĉion ili trovas ne bona, kaj por ĉio ili trovas ion pli bonan; per klopode serĉitaj ekzemploj ili penas aperigi mallogikajn en la verkoj de Zamenhof, kaj pli ol unu, ĉe se tion li ne kuraĝas konfesi publike, intime opinias, ke Zamenhof estis mallerta fuŝulo... Kompatinduloj, el kiuj la plej klera staras mil futojn almenaŭ malsupre de nia Majstro!

«Unu vidvino havis du filinojn...» Unu! Ha! Kia afero!...

Se ni estus dediĉintaj al la propagando de esperanto tiom da paroloj, da skribaĵoj, da argumentado, kiom naskis tiu simpla frazo, kiun infano facile komprenas, la tago de la fina venko certe nun alproksimiĝus.

ERA.

Ĉiujn leterojn, manuskriptojn, librojn, gazetojn, komunikojn, k.a. oni bonvole adresu al s-ro Georges Avril, direktoro de «Nia Gazeto», 29, avenue de la Victoire, Nice (Francujo).

La korespondadojn por nia ĉefredaktoro oni direktu al s-ro Grenkamp, 117, boulevard Jourdan, Paris (14°).

deziras kunlaboron kaj liberan ligadon kun la tuta mondo. Kaj ĉe se tio saĝas momente neatingebla, ni kredas tamen, ke la venontaj generacioj vivos en pli bonaj rilatoj.

La kvaronhoro pasis. Oni telefonas. S-ro ministro Stauning devas iri al la ministrala kunveno. Mi adiaŭas respektive tiun energian viron, de kies manoj kaj cerbo dependis tiom ofte la sorto de la dana popolo.

S. GRENKAMP.

NIAJ PIONIROJ

LA 2-A TUTRUSLANDA ESPERANTO-KONGRESO: REMEMOROJ DE ĜIA PREZIDINTO, GENERALO ILLASEVIC

Jam antaŭ 1914 estis en Ruslando vigla esperanto-movado. Kie malaperis iliaj gvidantoj post la granda milito? Ĉu ili vivas fremdlande, kiel elmigrintoj, ĉu en sia lando perdis?

Ni sukcesis trovi en malgranda industria urbo de la francaj Alpoj generalon Illaseviĉ, prezidanton de la esperanto-societo de Kievo kaj de la 2-a Tutruslanda Esperanto-Kongreso. Maldika, kun voĉo iom kruda, kutimiginta je ordonoj, vigla malgraŭ ĉiuj siaj travivaĵoj, li rakontis al ni siajn impresojn.

Ili estas tiom pli interesaj, ke ili koncernas malfacilan periodon de nia movado. Efektive, en 1911, kapitano de ĉefa stabo Postnikov, prezidanto de «Tutruslanda Ligo Esperantista», estis kondamnita al sengradigo kaj punlaboroj pro ŝtata perfido. Kiu povus ŝtopi, ke ĉi tiu brila oficiro, partopreninta la rusa-japanan militon havinta multajn oficialajn ribatojn, delegito de la rusa registaro dum la Kongreso de Washington, tuj post la Unua Tutruslanda Kongreso en kiu partoprenis d-ro L.-L. Zamenhof, estus perfidulo kaj ke ties esperanta laboro nur maskus liajn malhonestojn?

— La 2-a Tutruslanda Kongreso estis organizita, rakontas al ni generalo Illaseviĉ, okaze de la tutlanda terkultura ekspozicio en Kievo. Samtempe estis malfermita riĉa ekspozicio pri nia movado. Laboris por la Kongreso junuloj kaj studentoj, la plej agemaj membroj de la societo «Verda Stelo». Mi estis tiam artilleria kapitano kaj revenis el Francujo en aprilo, tri monatojn antaŭ la malfermo de la Kongreso en aŭgusto.

«Mi rememoras la detalojn, li daŭrigis elvokante la pasintajn, kvazaŭ la Kongreso okazis hieraŭ. Venis cento da delegitoj, eĉ unu el Azia Rusujo, kaspia regiono. Li cetere partoprenis la Berlinan Kongreson.

«La Organiza Komitato de la Kongreso proponis, ke oni elektu min prezidanto. Ĝi estis por mi granda surprizo. Eble mia nomo estis proponita kiel rebato al la malfeliĉa afero de kapitano Postnikov.

«Ĉiuj raportoj — ili estis multenombraj — estis prezentitaj en esperanto. Je la fino de la unua kunveno, mi proponis, ke pere de la Ministro de la Kortego oni sendu telegramon al la Imperiestro. La propono estis entuziasme akceptita.

«Samideanoj multe laboris, ĉar estis verdire la unua nacia kongreso, post kiu ili antaŭvidis progreson de nia movado. Oni ne forgesis la distraĵojn kaj avantaĝojn, kiel senpagajn trambiletajn, ktp.

«Bedaŭrinde ne estis eble al la Komitato presigi, kiel ĝi deziris, detalan raporton pri la kongreso.»

— Kaj poste? demandis ni.

— Du jarojn poste venis la milito. Mi tuj foriris kun mia regimento kaj ekis el la prezidanteco de «La Verda Stelo».

«Nun pasis dudekdu jaroj. Kiom da grandaj okazaĵoj... Depost la milito, kiun mi partoprenis ĝis la lasta tago, mi estas elmigrinto. En Bulgarijo, kiel en Francujo, mi trovis afablajn samideanojn.

«Kvankam maljuniginta, mi restas ĉiam fidela al nia afero, finis generalo Illaseviĉ, al la deklaro de Bulono. En mia urbo mi akceptis postenon de delegito de M.E.A.»

Sur lia vizaĝo ni rimarkas esprimon de la travivitaj suferoj. Li pensas eble al sia patrujo. Sed tuj, energia premo malaperigas lin.

L. L.

LAZURA MARBORDO

Transmare per letero
(Ne batu tiel, kor'!)
Alvenas violeto,
Amie premita flor'.

Vi volas kion, larmo?
Vi kverus kial, kor'?
Revivas kia ĉarmo
Per vi, mortinta flor'?

La bordo jam lazura
(Ho, Riviera flor'!)
Sur lila rozetura
Malvarme revu, kor'!

JOAB ELIOT.

MIA ANGULO

En printempa pluvego

La reviviĝinta printempo forlogis min el la ĉambro al vespera promeno en la urba ĝardeno. Miaj paŝoj mezuris la kurbajn vojojn, mia rigardo preterglitis la parojn, sidantajn sur benkoj en la ombra denso. En la haŭso de miaj pensoj alternis la zorgoj de la hodiaŭ kaj revoj de la morgaŭ. Rezigno kaj ambicio pelludis en mia animo. Koncize do, min regis humoro de laciginta vojserĉanto, kies refreŝigo fontas el sekigintaj putoj de la forkurinta juneco.

Subita nokto surprizis min. Akra vento hirtigis la foliaron de arbetoj kaj fortimigitaj grupoj de hejmenkurantoj konsciis min pri proksimiganta tempesto. Per rapidigitaj paŝoj mi sekvis ilin.

El nigraj nuboj zigzagis blankaj fulmolumoj. Ektondris la ĉiela artillerio kaj tuj poste densa printempa pluvego tamburis alarmon sur la trotuaroj. Dum momentoj ŝtopiĝis la kanaloj kaj la stratvojo similis al senponta rivereto.

Mi rifuĝis en profundon de pordego. Rigardo de ama paro, tenanta sin korĉekore, akceptis min. Ili ne parolis, sed la okulparoj malafable fiksiĝis al mi, al la enrudiginto. Mi komprenis ilin kaj pro la kaŭzita ĝeno iom honte, iom pente mi turnis min for de ili por spioni la senstelan kupolon... Tiel estas dece!... Estas printempo... Sezono de la kantan-taj koroj... La solulo ne rajtas konsterniĝi, nur envii... Jes, nur envii!

Neniam mi konis la envion. Mia vivfilozofio tenis ĝin for de mi. Iliaj flustra babilado kaj kelkaj tro laŭtaj rimarkoj, kaŝantaj la erupciigintan kideziron, ektiklis mian koron kaj en mia muta rideto nestis la neeldirita penso: jen, nenio ŝanĝigas!... Iam ankaŭ mi laŭt-vorte malpacienis pro la malagrable pluvego, kvankam kore mi deziris ĝian lufnaktan daŭron... Iam ankaŭ mi volonte toleris la malliberecon en profundo de pordego, ĉar korkaresa knabina rigardo katenis min.

Nun, iamaniere mi sentis, kvazaŭ mia pasinteco fantomadis malantaŭ mia dorso, tamen mi ne riskis turni min kontraŭ ĝi. Mi sciis, ke la kontraŭrigardo forpelus la revenintan pasintecan kaj mi renkontus nur malamikan rigardon de du ardantaj okulparoj... La pasinteco havas rajton resti nur malantaŭ ni.

La pluvego maldensigis, subite haltis. La vivo de la strato revigligis. Kun laŭta ridado, petola babilado aperis la hejmenrapidantoj kaj piedpinte paŝante, jen saltetante, jen forglitante, sed ĉiam tenante sin tute proksime al la muro de la domoj ili rifuĝis de pordego al pordego. Ankaŭ mi preparis min por heroa forkuro, sed ĉe mia elpaŝo surdiga fulmotondro kaj nova pluvatako surprizis min kaj mi resaltis sub la volbon de la pordego... Mi puŝigis al ĵus alveninta rifuĝanto. Momente mi ne vidis ĉu tiu estas viro aŭ virino.

— Pardonon! mi murmuris.

— Negrave, respondis virina voĉo kaj ŝi iom flankenŝoviĝis por cedi lokon por mi.

Ni staris unu apud la alia kaj nia rigardo esploris la senkonsolan firmamenton. La ĉiela beno torente fluis. La fulmoj sinsekve, kvazaŭ kontinue iluminis la nokton. Malantaŭ ni tremanta knabina voĉo serĉis defendon.

— Petro, mi timas... kiel mi timas...

— Ne timu, kara, ĝis vi vidas min — vira voĉo kvere trankviligis sian parulilon.

Ironia rideto, aperanta ĉe miaj buŝanguloj, pravigis lin. Vere, ŝi ne havas kaŭzon por timi ĝis ŝi vidas lin!... Kaj tiu ironia rideto montris, ke oni estas forgesemaj. Iam ankaŭ mi same trankviligis iun. Hodiaŭ ne povus okazi, ke per tia stulta konvinkigo mi kuragigus iun. Multe da tempestoj mi jam vidis kaj en la nombro de miaj printempoj nun gravas nur la — nombro. La printempo iel forestas.

Ie proksime fulmofajro falis. La tondro ekskuis ĉion. La virino timigite ŝoviĝis al mi por momento.

— Terure, ŝi krietis.

— Jes, ĝi falis en la proksimeco — mi rimarkis kaj mia rigardo indiferece jeliĝis al ŝia vizaĝo, lumigata de nova fulmo.

La surprizo de rekono igis min ne plu turni mian rigardon for de ŝi. Mi ne sciis, kiu ŝi estas, sed mi sentis, ke mi konas ŝin, ke ne la unuan fojon ni renkontis nin sur la vivovojo. Mia memorpovo vicigis antaŭ si la vizaĝojn el la pasinteco. Vana serĉado kaj tamen la rekona sento firmiĝis en mi.

— Bona vetero por la tritiko — fine mi rimarkis duonvoĉe por igi ŝin daŭrigi kutiman sensignifan konversacion. — Tre, tre necese!

— Jes, necese... sed tre malagrable — ŝi respondis post ioma konsidero.

Mi akre atentis pri ŝia voĉo. Eble ĝi helpas en la memorserĉado. Ĝi ne helpis, nur plifortigis mian senton.

— Jes, malagrable... precipe se iu loĝas malproksime — mi daŭrigis singarde. — Mi tre bedaŭras, ke mi ne havas ombrelon.

— Kontraŭ tia vetero la pluvombrelo neniam utilas — kaj momenta rideto heligis ŝian mienon. Niaj rigardoj renkontis sin.

En ŝiaj okuloj respeguliĝis la sama surprizo, kiel ĉe mi. Sed mi jam sciis, kiun la printempa pluvego pelis renkonte al mi. Ŝia rideto kaj la ronde streĉitaj okuloj revokis ŝian nomon al miaj lipoj.

— Klara!... Kia hazardo!

— Nu, jen vi... Kia surprizo!

Post longminuta vortserĉado, dum kiu ni ambaŭ ekiris sur la vojo de rememoroj, fine mi elcerbumis banalan komplimenton.

— Interese, vi neniel ŝanĝiĝis.

— Ankaŭ vi restis la sama — ŝi gentile mensogis. — Kvazaŭ ni estus vidintaj unu la alian nur hieraŭ.

Por atingi tiun hieraŭon mi devis revoki forgesitajn epizodojn el malproksimeco de dudek ses jaroj. Ni ekbabilis pri la nuĉo. Ŝi estis ĉe tajlorino por urgigi la pretigon de kostumo, kiun ŝi dezirus havi dum la geedziga festo de sia profesoro. Ankaŭ mi informis ŝin pri la triumfaj bataloj de mia nepo. Ho, ni neniel ŝanĝiĝis!

La pluvego obstine daŭris kaj nia konversacio ĉiam pli kaj pli ofte haltis. Sur la vojo de la pasinteco vagante ni ambaŭ forgesis pri la estanteo. Rememoroj distranĉis ĉiunminute la fadenon de la konversacio. Bildo, trudiganta el nia komuna printempo, sorĉis rideton sur miajn lipojn.

— Strange — subite mi diris — se mi bone memoras, tiel kune ni iam staris en profundo de pordego dum pluvo.

Ŝi ekridis, poste ŝerce ekminacis per fingro.

Ĉu ne honte tiel rememori?... Vi restis la sama, efektive la sama — kaj en ŝia riproĉo jam kaŝiĝis kora pardono.

La minacanta fingron delikate mi ekprenis. Ŝia mano preskaŭ kontraŭvole ŝoviĝis en la mian. Tiel ni staris denove spionante la nigran ĉielon kaj de tempo al tempo farante rimarkojn pri la «terura vetero». Pro proksima fulmotondro ŝi ekstremis kaj defendserĉe premis sin al mi por momento.

— Ho, kiel mi eklimis — ŝi senkulpiĝis sin.

— Ne timu, kara, ĝis vi vidas min — el miaj lipoj forglitis la stulta kuragigo kaj prefero mi estus laŭte ridinta pri mi, ĉar vole nevole mi devis konstati, ke mia voĉo same kveris kiel tiu de mia postdorsa junulo.

Sed mi ne ridis. Mirakla vizio tenis min en sia potenco. Sur ŝia vizaĝo en la lumo de fulmoj reaperis la printempa juneco, ŝiaj prujnluŝitaj haroj ricevis

«Sorto», de J.-W. Goethe

Nia volado estas antaŭeldiro de tio, kion ni faros sub ĉiuj cirkonstancoj. Sed ĉi tiuj cirkonstancoj ekkaptas nin laŭ iliaj propraj manieroj. La kio kuŝas en ni, la kiel nur malofte dependas de ni.

Niaj deziroj estas antaŭsentoj de la kapablecoj, kiuj kuŝas en ni, antaŭsenditaj de tio, kion ni estos kapablaj verki. Kion ni seipovas kaj volas, tion nia imagforlo prezentas ekster ni kaj en la estonteco; ni sentas sopiron al tio, kion ni jam silente posedas. Tiel ŝanĝigas pasia antaŭsento en la fakte eblan en revatan realecon.

Espero estas la plej bela heredaĵo de la vivantoj, kiun ili ne povus fordoni, eĉ se ili volus.

F. W. V.



Surŝipe al Stokholmo, s-ro Clausse, kolegiestro en Calais (Francujo) tegas Nian Gazeton.

sian orblondan brilon kaj en la bluo de ŝiaj okuloj same tremis la promesa rigardo, kiel iam... kaj poste...

...poste la pluvo haltis kaj ni ekiris al la sama direkto. Malantaŭ ni eĉis la paŝoj de la junaj geamantoj. Nia pasinteco sekvis nin. De la folioj faladis grasaj akvogutoj kiel la aŭtunaj larmoj. Nia muteco atestis pri tiuj pensoj, kiuj koncernis ĉion, kio iam apartenis al ni ambaŭ.

Ni atingis la stratangulon. Ĉe la tramhaltejo ŝi etendis sian manon por adiaŭi.

— Jen mia tramveturilo proksimiĝas — ŝi diris. Ĉu ankaŭ vi daŭrigos la vojon per la sama?

— Ne! De kelkminuta distanco estas mia loĝejo.

— Jes.

— Jes.

Post tiu ĉi reciproka «jesado» nia rigardo fiksiĝis al la lampo de la pli-proksimiganta tramveturilo. Malantaŭ ni kise adiaŭis la geamantoj.

— Do morgaŭ! Ĉu? — demandis la knabino.

— Jes, morgaŭ! — respondis ŝia kavaliro.

Mi rememoris pri simila preparolo de rendevuo, kies morgaŭo alvenis post dudek ses jaroj.

La veturilo alvenis. Gentile mi helpis ŝin ĉe la supreniĝo. La veturilo ekiris kaj mi vidis du virinajn manojn, signantaj adiaŭon kaj mi aŭdis du virinajn voĉojn krientaj: «Ĝis revido!... Adiaŭ!»

— Mankison, sinjorino — mi rekriis.

— Morgaŭ... certe morgaŭ — samtone kriis la junulo apud mi kaj li svingis sian ĉapelon ĝis malapero de la tramveturilo.

La rigardo de la junulo renkontiĝis kun la mia. En lia rigardo esprimiĝis junaga indifereco, en la mia versaĵo nestis scivolo.

Dum tiu nokto la dormo evitis min... Renkonti la pasintecan ofte estas dolore... kaj meditante pri la simboloj vekigis kompato en mi al la junaj geamantoj. Kiu scias, ke ni, marŝantaj antaŭ ili, ĉu ni ne simbolis la estontecan, ilian sorton?... Estus domage! Ili ja tiel kortuŝe povis forgesi pri la prozo de la Vivo.

JULIO BAGHY.

Nodier kaj la Lingvo Internacia

La romantika movado ĝenerale ne estis tre favora al la ideo de lingvo internacia: naskiĝinta kiel reakcio al la raciismo de la antaŭaj jarcentoj, ĝi vidis en la lingvo esence senkonsecan kreadon de la popoloj. Por la romantikistoj, same kiel la nura vera poezio estis la popola poezio, la nura vera lingvo estis la popola lingvo. La lingvo kulturitaj, raciigitaj, plenaj je neologismoj, konsecie riĉigitaj kaj poluritaj estis konsiderataj koruptaj kompato kun la pratempaj lingvoj, spontane elfluintaj el la popola inspiro.

Ankoraŭ nun, kelkfoje, oni trovas en la argumentoj de la malamikoj de lingvo internacia postrestaĵojn de tiu vidpunkto. Sed la plejmultaj jam scias, ke eĉ la plej « popola » dialekto portas en si eĥojn de kulturo, ke ĉiuj grandaj lingvoj evoluis sub pli malpli konseca kontrolo; ke la plej bone konstruitaj artefaritaj lingvoj estas *nur iom pli* artefaritaj ol la grandaj kulturlingvoj.

Inter la verkistoj de la Romantika periodo, Charles Nodier (1781-1844) estas konata pro liaj rilatoj kun Victor Hugo kaj pro kelkaj ĉarmaj noveloj, *Trilby*, *la Fée aux Miettes* (la Feino je la Panpecetoj), *le Chien de Brisquet* (la Hundo de Brisquet), sed oni preskaŭ forgesis liajn filologiajn verkojn, pri Elementoj de Lingvistiko aŭ pri Onomatopoej.

En la verketo *Notions élémentaires de linguistique* (*Ŭvres*, t. IX, Bruxelles, 1834) ni trovas kelkajn interesajn paĝojn pri la ebleco kaj la celo de lingvo internacia. Kvankam Nodier aludas (pp. 35-36) pri la tiutemaj verkoj de Dalgarno, de Wilkins, de Leibniz, li tamen ne pensas pri filozofia lingvo, sed pri lingvo internacia pli moderna kaj praktika.

« Kio restas farota en la lingvistiko — li diras en la konkluda ĉapitro (pp. 267-269) — estas la provo, inda almenaŭ esti plurfoje tentata, de la konvencia lingvo proponita antaŭ long tempo; lingvo nur reala, tute dediĉita al la esprimo de la plej familiaraĵoj faktaj, de la plej komunaj bezonoj, de la interŝanĝoj kaj de la amikaj interrilatoj, kies neceso oni plej ofte sentas; lingvo nevasta, sed sufiĉa; materia, se oni povas tiel esprimiĝi, kaj ne intelekta, sed kiu ĉirkaŭprenas sen peno ĉiujn fizikajn rilatojn de homo kun homo; lingvo kies universaleco ne ŝajnas al la penso pli neatingebla ol la numera cifero, la astronomia cifero, la hemia kaj farmacia cifero; lingvo kosmopolita, kiu postulus apenaŭ kelkajn studolagojn de la civilizitaj popoloj, kaj kiu malfermus al ĉiuj vojaĝantoj la vojon de ĉiuj landoj; lingvo artefarita, sed eminente sociala, kies certa rezultato estus plifirmigi, per gastamaj interrilatoj, la ligilojn de la natura frateco. Mi ne estas certa, ĉu Dio ĝin permesas; sed almenaŭ la homa spirito povas ĝin provi, kaj tiu laboro estus tiel facila en la plenumo, kiel ĝi estas nobla en la objekto. Nur la sperto — kaj meritas ĝin provi — povas iluminii nin pri la ebleco de ĝia apliko ».

Iom malpli optimisma ol en tiuj ĉi konkludaj paĝoj Nodier sin montras en alia ĉapitro de la verko, kie li aldonas kelkajn detalojn pri la vojo eble sekvota. En la ĉapitro pri la « Konvenciaj lingvoj » t. e. pri sciencaj terminologioj, ktp. (p. 240) li denove parolas pri la « karakterlingvo de Leibniz » dirante ke oni ne ĝin faros. Se oni ĝin faros, tio okazus pere de procedoj tre similaj al la konvenciaj lingvoj pri kiuj mi parolas, t. e. profitante je la kvar aŭ kvin cent neŝanĝeblaj radikoj, kiuj liveras ekskluzivajn materialojn al la vortkonstruado ».

Post unu jarcento, ni vidas, ke lingvo simila al la antaŭdirita pacience gajnas al si sian lokon en la mondo.

BRUNO MIGLIORINI.

LA VERDA LACERTO

La verda lacerto (*Iacerta viridis*) estas besteto tiel gracia, ke ĝi estas simpatia eĉ al tiuj personoj, kiujn naŭzas la ajn rampulo.

Ĝia kutima restadejo troviĝas sur la deklivo de iu vojfoŝaĵo aŭ ĉe la bazo de iu heĝo. Jen ĝi mem fosas sian truon, jen ĝi okupas la forlasitan tereston de iu rodulo; arvikolo aŭ kampomuso, jen fine ĝi loĝigas en iu roka fendeto.

Cetere, ĝi ĝenerale faras ĉion eblan, por prepari al si multajn ŝirmejojn de ĝi okupotajn kiel rifuĝejojn, kiam iu ajn danĝero ĝia minacas, kaj de sia rifuĝejo ĝi malofte malproksimiĝas.

Dum la bela sezono, preskaŭ ĉie oni renkontas la verdan lacerton. Ĝi ne surgrimpas arbojn, sed supreniras veprojn kaj densajn heĝojn, por sub suno varmigi kaj insektojn ĉasadi.

Somere dum varmegaj horoj, tiu lacertulo forlasis la ŝtonojn tro varmigitajn de la suno, por serĉi sub herboj iom da malvarmeco. Male, kiam pluvigas, ĝi restadas sur altaj lokoj malkovritaj, ĉar tro grandan malsekecon ĝi ne timas.

Vintre, — dum novembro, la verda lacerto komencas travintri. Sola aŭ kune kun kelkaj samspecanoj ĝi rifuĝas en teraŭ roktruon. Tie, senmova kun fermitaj okuloj ĝi tamen ne estas senmova rigidita. Pli frosto-sentema, ol la mura lacerto (*Iacerta muralis*) ĝi ne eliras antaŭ la 15a de februaro. Vintre, dum la bela vetero, ĝi neniam iras varmigi sub sunon, kiel faras la mura lacerto. Dum la tempo, kiam ĝi travintras, la verda lacerto kiel ĉiuj rampuloj vivas per sia grasa rezervo konsistanta el du flavaj masoj lokitaj ambaŭflanke de ĝia ventroparto.

En la monato marto ĝi nur komencas sin nutri. Dum aprilo ĝia apetito pliiĝas; ĝi avide mangegas dum la sekvantaj monatoj. Ĝia kutima nutraro konsistas el insektoj, kankretoj kaj moluskoj.

Komence de oktobro, ĝia apetito ree malpliiĝas; nun posedanto de novaj kaj grandaj grasrezervoj la lacerto estas de nove preta por travintri.

Ĉasado. — Kiam la verda lacerto kaptas iun besteton ĝi premas sian kaptadon inter siajn neetendeblajn makzelojn, kaj helpas al si per ŝtoneto aŭ branĉeto por ĝin disŝiri. Tion farinte ĝi per sia duparta lango frande sin liplekas.

Dum sia aktiva vivo plurfoje la lacerto hantusangas.

Ne nur bela kaj utila besto ĝi estas sed ankaŭ kuraĝeta. Ĝiaj ĉefaj malamikoj estas: la mustelo, kiu iafaje, dum la batalo, lasas parton de sia vosto — katoj, faĥoj, vipuroj kaj ĵuspecaj koluboj. Tre ofte ĝi estas la venkanto kaj pro tio oni neprave konsideras ĝin, kiel malbonan beston.

Kiam la fortoj de la batalantoj estas tro malegalaj, timante esti kaptota, la verda lacerto rapide forkuras, brue sin traŝovas tra la dornarbetojn.

Kaptado per lazo. — Ofte la kamparanoj knaboj mane kaptas ĝin; sed tion farante, oni riskas disigi ĝian facilrompeblan voston. Iuj natursciencistoj inventis ĉiuspecajn rimedojn por ĝin kapti. La plej taŭga el tiuj rimedoj ŝajnas esti tiu de s-ro Rollinat, konsistanta el la lazo pendanta ĉe la ekstrema deo de fiŝbastono. La rampuleto mallaboreme kuŝanta, ne sin gardas pri la bastono direktita al ĝi; la ĉasisto malrapide pasas la maŝon ĉirkaŭ la kolon de la besto, kiu tiamaniere estas kaptata.

La sezono dum kiu la verda lacerto sin reproduktas, komenciĝas dum aprilo. Estas en tiu-ĉi epoko, ke la virseksuloj kverelas kaj batalas por konkeri la inojn. Ofte dum tiuj bataloj ili elŝiras al si la vostojn. Sed estas tie nur provizora stumpo, ĉar la rompita organo rekreskas, preskaŭ simila al tia, kiu ĝi estis antaŭ la rompiĝo. Iafaje sur la cikatro kreskas du aŭ tri burĝonoj, kiuj poste naskas du aŭ tri ventumilformajn vostojn.

La inoj ovonaskas de majo ĝis oktobro. Siajn ovojn, kies nombro estas de 5 ĝis 21, la inoj demetas sub terbulon aŭ en grundfendeton, aŭ en de ili mem elfositan kavaĵon en pulvorigema grundo. Post la ovonasko la ino retiriĝas kaj prizorgas nek la kavon nek la ovojn en ĝin metitajn. La ovo estas meznombre 15 ĝis 18 mm. longaj kaj 10 ĝis 13 mm. larĝaj. Ili estas iom rondformaj, blankaj, pergamentecaj kaj elastaj. La sunvarmo ilin elkovas. Elkovitaj, la idoj tuj eliras el la ovonaskotruo, kaj kuras por rifuĝi en ŝtonamasojn aŭ sub herbojn.

Familia besto. — La verda lacerto estas inteligenta kaj facile hejmeĝigas.

Post kaptiteco de kelkaj semajnoj, konante sian mastron, ĝi lasas sin premi kaj karesi. Oni ĝin nutras per lumbrikoj, blatoj kaj muŝoj. Oni devas ĉiam lasi al ĝia dispono akvuĵon, plenigitan per freŝa akvo. Vintre ĝi sin kaŝas sub sablon en sia kago, kiu devas esti lokita en ĉambro, kies

LINGVAJ STUDIOJ

En *Nia Gazeto* de aŭgusto nederlanda leganto skribas: « Gramatika pravigo de « paŝon post paŝo » ne troviĝas, sed la notoj de D-ro Corret kun citoj el Zamenhofaj verkoj jam montras, ke Zamenhof mem en pli malfruaj verkoj uzadis la akuzativan formon en tiaj okazoj. Sento kaj logiko postulas tiun kazon, kaj pravigon mi jam donis antaŭ kelkaj jaroj en jena artikolo, kiu ŝajnas tre primitiva, sed tamen klarigas gravajn aferojn ».

La substantivo aperas en sia nuda formo, kiam oni nomas ankaŭ nominativo, nur kiel subjekto de frazo aŭ tie, kie per la egaliga verbo « esti » ĝi estas egaligata al la subjekto, ekzemple:

La patro (subjekto) estas tajloro (predikato).

Oni povas diri ankaŭ: *Tajloro estas la patro.* La senco restas ĉiam sama. Kelkaj verboj enhavas en si la verbon esti aŭ la senco « ke estu »; ankaŭ post ili tial staras la substantivo en sia nuda formo, ekzemple:

La veninto ŝajnas (esti) amiko.

La ĉeestantoj elektis lin (ke li estu) prezidanto.

La katastrofo faris lin (ke li estu) malriĉulo.

En ĉiuj aliaj okazoj (do: kiam la substantivo ne estas subjekto aŭ egaligita al la subjekto) *prepozicio aŭ la finiĝo* n devas montri la rolon, kiam ludas la substantivo en la frazo. La substantivo ne povas stari nuda. Ekzemploj:

La patro parolas kun la tajloro.

La kuko kostas dek groŝojn.

Ni foriris spite je la pluvo (aŭ: spite la pluvon).

Rilate je tiu punkto via opinio estas [malprava].

Notu bone, ke la vortoj « spite » kaj « rilate » (same kiel koncerne, escepte, laŭlonge k.a.) ne estas prepozicioj, sed adverboj. Oni do devas ligi ilin al la substantivo per prepozicio; ĉu oni tie uzas la prepozicion je aŭ al aŭ de aŭ simple la akuzativon, tio dependas de persona sento kaj de kutimo.

Vortoj kiel « kaj », « ol » ne estas prepozicioj, sed nur vortligiloj (konjunkcioj); oni do post ili devas uzi prepozicion aŭ akuzativan formon, se ili ne rilatas al la frazsubjekto mem, ekzemple:

Si amas la patron kaj la patrinon.

Vi decas elekti pomon aŭ piron.

Mi riproĉas la knabon pli ol la knabinon.

Tre ofte simpla, akuzativa formo (kun n) montras la rolon, kiam ludas substantivo, kiu ne estas subjekto de la frazo, ekzemple:

Mi atendis unu horon.

Li iris brakon sub brako.

Li promenis la ĉapelon en la mano (aŭ: kun la ĉapelo en la mano).

Paŝon post paŝo ni atingos la celon.

Kiam oni pripensas bone tiun simplan mekanismon de nia lingvo, oni komprenas, ke esperanto tute ne povus ekzisti sen la akuzativa formo.

Kiam el du substantivoj oni per kunmeto formas unu ideon, kiel ekzemple el « botelo » kaj « akvo »: akvobotelo, oni devas skribi la novan ideon per *unu sola vorto* aŭ interligi la du partojn per streketo, se pro troa longeco la vorto farigus neklara. Estas do necese, skribi « Esperanto-Asocio » kun interliga streketo. Sen streketo, la esprimo ne havus senco; ĉar du substantivoj staras kune sen prepozicio, kiu klarigus la rilatojn inter ili. Do, oni povas skribi « Esperanto-kurso » aŭ « Kurso de Esperanto ».

OSCAR BUNEMANN, LK-ANO.

temperaturo ne estas malpli ol kvadrada. Oni citis kelkajn famajn ekzemplojn pri domaj verdaj lacertoj; inter ili tiun de la natursciencisto de Quatrefages. Krom salataj mitraĵoj, tiu besteto mangiĝis ĉion: muŝojn, mielon, konfitaĵojn, plumaturajn fruktojn. La scienculo rimarkis, ke lia bredito havis egan aŭdokapablon kaj tre ŝatis melodijajn sonojn. Ofte la afabia besteto rifuĝis en poŝon de sia mastro, kaj kiam hazarde tiu ĉi eniris ĉambron, kie oni muzikis, oni vidis kiel la lacerto eliris, grimpis ĝis la kravato de la scienculo kaj de tiu stranga observejo sciroleme rigardis la kunvenantaron.

D-RO MALMANCHE.

El la Esperantista Akademio

Ni ricevis, jenan leteron de s-ro Rollet de L'Isle. Pro foresto de s-ro Grenkamp ni publikigos ties komenton al tiu letero en la proksima numero:

Parizo, 29-an de aŭgusto 1934

Al la direktoro de NIA GAZETO.

Estimata Sinjoro Direktoro,

Vi publikigis en la aŭgusta numero de via gazeto *nesubskribitan* artikolon titolitan « Kien vi iras, Esperantista Akademio ? »

Mi kun plezuro legis ĝin, ĉar ĝi pravas, ke vi interesiĝas pri la Lingvaj Institutioj, pri kio bedaŭrinde, laŭ la trafa rimarko de la aŭtoro « oni ĝenerale nenion skribas ».

Sed en ĝi estas kelkaj faktaj eraroj. 1-e) La divido de la listo de la oficialigitaj vortoj, en du partojn estis proponita al la Akademianoj, kies plimulto (15 el 17) aprobis ĝin. Ĝi ne estis proponita al la Lingvakomitatoj por aprobo, ĉar tiu arango ne estas « lingva novaĵo » (art. 22). Pri ĝi neniu LK-ano protestis; sekve tiaj protestoj ne « haltigis la aferon kaj enterigis la tutan problemon ».

2-e) Pri la cirkulero de Januaro 34 rilata al la elektoj en la Lingvan Komitato, mi ricevis ne « multajn protestojn » sed nur du, unu de s-ro Grenkamp-Kornfeld, al kiu mi ne respondis pro ĝia batala formo, kaj alian de mia amiko Chavet, al kiu mi pravis, ke li eraris, kaj ke la nova arango ne enkondukas ŝanĝojn en la Regularon, kaj sekve ne devas esti prezentita por aprobo al la L.K. Ĝi estis prezentita al la Akademio, kaj aprobita de ĝi. Plie, kiel dirite en la cirkulero mem — kiam vi publikigis — tiu arango estas aplikata prove dum la jaro 1934. Pro tio ne estus utile oficialigi ĝin antaŭ ol la rezultato de tiu provo estos konita.

En tiu artikolo troviĝas ankaŭ kelkaj kritikoj pri mia maniero plenumi mian rolon de prezidanto. Kvankam mi ne kutimas respondi al anonimaj kritikoj — kiuj ne pravas grandan kuraĝon de la aŭtoro — mi tamen, pro la graveco de via gazeto, donos kelkajn klarigojn pri la aluditaj temoj.

1. — Por la elektoj en la Akademio, de Februaro 34, estis prezentita neniu kandidato. Pro tio la prezidanto proponis al la Akademio, kiu konsentis, konsideri kiel kandidatojn tiujn, kiuj ne estis elektitaj en la antaŭaj balotadoj de junio 32 kaj majo 33. Same faris prezidanto Boirac en 1913, prezidanto Warden en 1932 kaj sekretario de Lafarte, kun aprobo de la Akademio, en majo 1933. Kaj tio estas neriproĉinda, ĉar se kandidato ne estas elektita, tio pravas, ne ke li ne estas inda, sed ke la elektintoj preferis aliajn el la prezentitaj kandidatoj.

2. — Nenio, en la Regularo, montras, ke kreado de nova Sekcio devas esti aprobita de la LK-anoj; ĝi estis aprobita de la Akademio, kaj ankaŭ elekto de mi, kiel provizora direktoro. Mi konsentis direkti ĝin, kiel mi deklaris, ĝis kiam ĝi kontentige funkciados, por eviti al la nova direktoro solvi la malfacilaĵojn, kiujn renkontas ĉiam nova organo.

3. — Mi tiel malhulte deziras « bagateli » la LK-anojn, ke mi kreis « Oficialajn Sciigojn de la Akademio », kies 4 aperintaj numeroj estis senditaj al ĉiuj LK-anoj kaj esperantistaj gazetoj. La protesto pri la novaĵoj kiel mi ĵus montris, ne estis sufiĉe gravaj, por ke estu interese publikigi ilin; se la aŭtoroj ne same opinias, ili povas per leteroj aŭ gazetaj artikoloj informi la interulojn. La de vi presita artikolo estas la unua de tiu ĉi speco, kaj vi konstatas, ke mi volonte respondas.

Mi aliparte estos ĉiam kontenta scii pri la kritikoj, ĉar mi opinias, ke, plej ofte, ili estas utilaj al oficialaj organizaĵoj. Sed mi petas vin sendi al mi la numerojn, kiuj entenas ilin, ĉar la Akademio — pro manko de mono — ne povas aboni ĉiujn esperantistajn gazetojn.

Korege via,

ROLLET DE L'ISLE.

P.S. — Mi permesas al vi publikigi tiun ĉi respondon se vi opinias utile trankviligi viajn legantojn pri miaj « diktatorecaj » intencoj. — R.

NIAJ ABONEJOJ

SVEDUJO:

Sveda Esperanto-Federacio, Stockholm I (Poŝtĉekk. 2012).

JAPANUJO:

Tokio-Do (Esperanto-Fako) Kuranĉita, Koŝijamaĉi, Tokio.

NIAJ ABONEJOJ

NEDERLANDO:

Esperanto-Instituto, Poŝtfako 81, Venlo (Poŝtĉekk. 230.505).

ĈEĤOSLOVAKUJO:

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista, Uralské 447, Praha, XIX.

La Tago de la Filmoj

La sesan tagon de la stokholma kongreso, kiu cetere plenrajte postulas la titolon de la plej eleganta esperanta kongreso, antaŭtagmeze la subskribanto de tiu ĉi modesta artikolo staris en malhela ĉambro kaj montris al la publiko scenojn el la « Tragedio de l'Homo ». Tio estis la komenco. Je la dekkua Sam Owen Jansson prezentis belajn svedajn etnografiajn filmojn, kies rolantoj estis simplaj, svedaj kamparanoj. La ludo tiamaniere estis tute natura, nur la plej maljuna rolanto, okdekjara maljunulino, montriĝis iom ner-



JEAN FORGE

voze rapidema antaŭ la maŝino. Kun granda miro ni rigardis la filmon kaj admiris la grandiozan forton, kiu triumfas eĉ la ofte kruelan nordan naturon. Eŭrope, sekvu la ekzemplon de la esperantistoj, venu lerni al la Nordo.

Post la du etnografiaj filmoj, ni kuris en la elegantan filmpalaceton, Palladium, kie ni povis vidi la unuan, longan esperanto-filmon. Antaŭ la filmo ni aŭdis paroli s-ron Grenkamp-Kornfeld, kiu laŭŝajne ne restis tute indiferenta en Stokholmo kontraŭ la virinaj koroj; mi ja ne konis lin antaŭe, mi nun do sciiĝis persone de li, ke li estas ravita de Svedlando kaj ties inaj loĝantoj. Cetere mi ne miras pri tio. Sed mi ja volas paroli pri la filmoj. Nun sekvis mallonga kongresraporto kaj poste kun pia sento ni rigardis malnovan filmon, el 1912, prezentantan, — bedaŭrinde sen tonoj — la parolantan Zamenhof, kaj nun sekvis la tre atendita ĉefa filmo: « Morgaŭ ni komencos la vivon ». Do, ni skribu mallonge pri tio. La prezentita filmo sendube estis bone elektita por esti la unua esperanta parolanta filmo. Ĝia moderneco, absolute originala koncepto, kiu tamen ne erarvojas al troaj ekstremitoj, relative malmulte da teksto, eksterordinare lerta aranĝo kaj la artaj fotoj certe kvalifikis ĝin por la entrepreno. La enhavo de la filmo estas rakonteblo per kelke da vortoj. Homo, kiu liberigis post kvin-jara mallibero, — dramo de jalujo — hejmenvenas plena de esperoj. — Morgaŭ ni komencos la vivon. — Sed la fatalo miksis sin en la aferon. Li kaj la edzino ne renkontiĝas kaj venas longa, incitoplena tago; plena de misaj situacioj, sed fine en tre bele konceptita kaj absolute ne ŝablona « happy end », en ununura momento, solviĝas ĉiu streĉo, kiu jam minacis per katastrofo. Al tiu simpla historio donis poeziajn rimarkojn, brilantan psikologion la lerta, pli ol lerta, arta mano de la reĝisoro kaj la sukceson plenrajte partoprenis la tonoj, kantoj kaj voĉoj, kies posedantojn kaj verkantojn, ni sennome gratulas ĉi tie. — La rezulto, kiu estis frukto de ununokta laboro, estas mirinde bona kaj ni preskaŭ kuraĝas kredi, ke la sinkronizo pri tio sukcesis tiom rapide, ĉar la « voĉ-pruntantoj » ne estis aktoroj, sed fervoraj ofereblaj esperantistoj.

La filmo estis sukceso kaj nun ni volis etendi niajn de la sidado lacajn membrojn, sed tiam eksonis la ŝatata voĉo de prof. Migliorini, kiu anoncis al ni, ke nun ni povos vidi la filmon pri la nova kongresurbo, Romo. Tre bone, — ni konstatis kontente kaj mi vidis la eternan urbon kaj aŭskultis la ĝemspiron de la du tre simpatiaj svedinoj — (ankaŭ mi ne povas malmali ilin) — kiuj provizore ne havas ŝvelilon al la venontjara kongreso krom la forto de la sopiro, kiu ne estas malfaksinda faktoro. Kaj nun finiĝis ankaŭ la filmo pri Romo kaj ni denove etendis niajn lacajn membrojn kaj kontentaj ni intencis forlasi la teatron, kiam eksonis super ni tre ĉarma barbo, alia tenoro kaj sciigis al ni, ke denove ni vidos filmon pri Sicilio. Ni residis kaj denove ni estis tre kontentaj

Tra Norda Svedujo Postkongresa Ekskurso

Post la 26-a Universala Kongreso de Esperanto, Sveda Esperanta Turista Komisiono inter alie aranĝis tre interesan kaj amuzan vojaĝon al la plej norda Svedujo, nome al Laponio kaj la norvega urbo Narvik. Estas sufiĉe malfacile priskribi la impreson de tiu vojaĝo, ĉar preskaŭ mankas al mi vortoj esprimi la sentojn koncerne la ege grandiozan naturon en tiuj regionoj.

Tamen mi provos rakonti iom pri la vojaĝo kaj la restado en diversaj lokoj.

La kongreso estis fermita kaj la esperantistoj unu post la alia forlasis la urbon. Tiel ankaŭ tiuj, kiuj partoprenis en la karavano al Laplando.

Entute cent dudek personoj el dek kvar diversaj nacioj. Dum la unua horo de la vojaĝo ni kiel eble plej bone konatiĝis unu kun la alia. Tio estas ja tre facila afero inter esperantistoj, kaj baldaŭ neniu plu sentis sin kiel fremdulo. Iom post iom ĉiuj malaperis, unu post la alia, por pretigi sin por la nokto. La plej multaj aspektis « iomete lacegaj », ne mirinde ĉar estis ja kongreso kaj multaj ne dormis eĉ nokte.

Ce la vekigo la venontan matenon ni estis jesuŝe multaj kilometroj de Stokholmo. La unuan tagon (ni daŭre troviĝis sur la trajno) la vetero ne estis tiel bela kiel ni dezirus. En unu momento pluvego, en alia brilis la suno sur la vastaj arbaroj kaj sur la belaj lagoj, grandaj kaj mal-

krematorio kaj la preĝejo. Aŭtomobilekskurso estis aranĝita al la malnova preĝejo vilaĝo Jukkasjarvi. Interesaj estis la lernejtendaroj, en kiuj la laponaj infanoj studas kaj loĝas dum la lerneja sezono. Ĉi tie ili estas instruataj svedlingve kiel aliaj infanoj. Krom la lapona kaj sveda lingvoj ili ankaŭ parolas la finan.

Tipa trajto de la lapona popolkaraktero estas granda amo al la hejma tendo. Laponoj tute ne volas loĝi kaj vivi en ordinara domo, kie li nepre ne sentas sin hejme. Nuntempe la komunumo bone zorgas pri la laponoj. Ni havis eblecon viziti hejmon por gemaljunuloj, tute komfortan kaj modernan. Sed malgraŭ la komforteco la maljunuloj ne fartas bone en tiu loĝejo, ĉar ili ĉiam sopiras al siaj tendoj.

Malgrandan epizodon mi memoras de la vizito tie. Unu el la loĝantinoj estis tre vigla kaj babilema. Tuj antaŭ nia foriro, sveda sinjoro donis al ŝi moneron. La maljunulino fariĝis tute sovaĝa pro ĝojo. Ŝi kore ĉirkaŭprenis lin, eble ankaŭ kisis lin, kaj dum kelkaj sekundoj ili « dancis » ion similan al ŝottis, malnova sveda danco, ekstere sur la ŝtuparo de la hejmo. Bedaŭrinde mi forlasis mian fotografaparaton en la aŭtomobilo sur la vojo, kaj do mi ne povis kapti la bildon de tiu solena momento. Post vizito en tre malnova preĝejo, ni reveturis al Kiruna.

En tiu urbo troviĝas multaj lertaj esperantistoj. La intereso por la lingvo estas granda, kaj mi konstatis, ke ankaŭ la infanoj bone parolas esperanton. Multe oni laboras tie por disvastigi la lingvon.

La tago en Kiruna finiĝis per granda festeno aranĝita de la tieaj gesamideanoj. Ce la stacio ni kolektiĝis kaj poste marŝis tra la tuta urbo al la restoracio en la popolkirko. Post bonvensaluto la orkestro ludis belan muzikon, kaj ni ricevis bongustan temango. Kelkaj fariis paroladojn kaj la tempo iom post iom atingis la horon por la dancado, kiu daŭris ĝis la venonta mateno. Kiam ni hejmeniris (dum la tuta vojaĝo ni loĝis en la vagonoj), ĉiuj estis vere kontentaj pri la neforgesebla tago kaj nokto en Kiruna.

Frumatene ni forlasis Kiruna. La trajno portis nin ankoraŭ pli norden. La vetero nun fariĝis tre bela, la suno brilis sur klara ĉielo, kaj ĉie ni vidis nekrovitajn



ELSA THORNBURG

grandaj. La naturo pli kaj pli ŝanĝiĝis. Anstataŭ ridetantaj valoj kaj ebenaĵoj plenaj de konstruaĵoj ni nun rapide trapasis grandegajn arbarojn kun nur malmultaj domoj, disigitaj unu de la alia per longaj distancoj.

La trajno alproksimiĝis al nia unua celo. Kilometron post kilometro tiris nin norden la du lokomotivoj, ĉar unu ne sufiĉis por la longa vagonaro el kiu ni esperantistoj disponis tri dormvagonojn kaj manĝovagonon. Kiel longa la trajno efektive estis, montras ŝerco, kiun ni aŭdis ĉe la stacio en Stokholmo, nome ke la lokomotivoj, kiuj vere ne estis videblaj, staris ie en la proksimo de Upsala, urbo situanta ĉirkaŭ sepdek kilometrojn norde de Stokholmo. La nordan polusan cirkon ni kun granda malpacieneco atingis kaj transpasis. Tre grave estis en la trajno aĉeti kaj skribi poŝtkartojn kaj ĉe stacio enkestigi ilin por havigi la tre valoran polusan poŝtstampon.

Post unu tago kaj du noktoj ni atingis la urbon Kiruna, kie ni restis dum unu tago. Frue matene ni forlasis la trajnon por promeni kaj rigardi la urbon. Bedaŭrinde pluvigis, pluvegis sed malgraŭ tio, la bona humoro ne mankis al la esperantistoj.

Post la lundo ni vizitis la minejon de Kirunavaara. Estis interese rigardi la laboron tie, de kiam oni per eksplodo disigas la ferŝtonon el la monto ĝis kiam ĝi estas preta por transporto al la norvega havenurbo Narvik. Kiruna estas la plej norda urbo en Svedujo kun ĉirkaŭ dek mil loĝantoj. Ĝi estas tute moderna kaj bela. La urbon ni tramigradis, rigardante ĉiujn vidindaĵojn. Vidindaĵo estis inter alie la tre moderna popollernejo, novkonstruita

ĉar Sicilio vere kaptas koron kaj okulojn. Bedaŭrinde ankaŭ la seĝo kaptis, ion, ĵes alian korpoparton. Kiam ni nun finis, kurego ni fuĝis el la teatro. La timo ne estis tute senbaza, ĉar senspire kiris post nin juna heroldo. Revenu, nova filmo! Sed tion ni jam ne rigardis. — Dum la nokto mi sonĝis, ke mi estis ligita al kino-seĝo kaj Jean Forge, kiel Mefisto prezentis al mi dum la tuta nokto esperantajn filmojn.

F. SZILAGYI.



NIAJ LAPONAJ GVIDANTOJ

montegarojn, kiuj impone levigis al la ĉielo. Kaj fine — Abisko, tre konata kaj multe vizitata turistloko. La klimato tie estas bonega kaj la ĉirkaŭaĵoj belaj. La noktomeza suno, kiu aperas dum kelkaj semajnoj ĉirkaŭ la mezsomera tempo, estas por fremduloj unu el la plej grandiozaj vidindaĵoj. Sed bedaŭrinde tiu tempo je nia vizito jam forpasis.

Kun lertaj samideanoj kiel gvidantoj ni suprengrimpis montegon. Tiu ekskurso estis tre laciga. La vojo ĝis la arblimo estis bona kaj facile irebla, sed poste... Ni terure soifis kaj soifis. Je la foriro, ĉiuj ricevis buterpanon kaj botelon kun trinkaĵo, ĉar ĉi ne intencis reveni antaŭ ol la vespero kaj devis tagmanĝi sur la monto. Kompreneble ni ne volis eltrinki la kunportitan trinkaĵon antaŭ la mangado sur la pinto. Malproksime super ni, ni vidis la neĝon kaj esperis, ke ni baldaŭ atingus tiujn regionojn, ĉar tie ni havus eblecon manĝi iom da neĝo. Spiregantaj ni daŭrigis la suprengrimpadon al la malproksima pinto. Subite ni ekaŭdis krion tra la silento. Kio okazis? Akcidento? Ne, akvon ni trovis. Ni tuj klinis la kapon al la tero; kaj rekte el la perlanta rivereto, trinkis la freŝan, klaran akvon. Poste, kun pligrandigitaj fortoj ni daŭrigis la vojon supren. Unu post la alia dume malaperis kaj ni povis vidi ilin kiel formikojn sube en la

malproksimo. Fine ni atingis la pinton. La buterpanoj kaj la trinkaĵo tre bongustis, sed la varmeco ĉi tie ne estis tro granda. Ni tamen sufiĉe baldaŭ devis forlasi tiujn altajn regionojn, ĉar post la granda varmeco ni nun ne plu sentis nin varmaj. La malsuprengrimado estis kompreneble pli facila. Ni transiris la tutan montegon kaj alveninte al la tero ni estis ĉirkaŭ dek kilometrojn de nia forirloko. Fervoj-aŭtobuso atendis nin kaj reportis lacajn kaj malsatajn montegrimpulojn al Abisko. Admirinda estis angla sinjorino, kiu malgraŭ siaj sesdek-kvin jaroj kune kun la plej fortaj el ni faris la tutan ekskurson.

Ekskurso al la laponaj tendaroj ĉe Palnoviken. Post vizito en kelkaj tendoj, du malgrandaj laponaj knaboj, portantaj la esperantan flagon, gvidis nin trans la monton al la landlimo inter Svedujo kaj Norvegujo. Tiuj knaboj estis tre lernemaj kaj post kelkaj horoj ili lernis sufiĉe multajn frazajn esperantajn. Ili promesis lerni la lingvon bone, por ke ili povu flue paroli kun ĉiuj je nia eventuala reveno. Je la foriro ni dankis la malgrandajn laponajn gvidantojn kaj ili adiaŭis nin per la bone elparolitaj vortoj: « Koran dankon kaj ĝis revido ».

Post du agrablaj tagoj inter laponoj kaj montegoj ni ankoraŭ unu fojon envagoniĝis por meti novan etapon malantaŭ ni, antaŭ ol ni komencos la revojaĝon.

Survoje al la norvega urbo Narvik! Ni atingis la landlimon, kaj kiel kutime venis la doganistoj por kontroli la pasportojn kaj la vojaĝantojn. Kelkaj el la svedoj (mi estis unu el ili) ne kunportis la gravan legitimilon. Kion nun fari? La doganistoj aspektis tre severaj kaj en la komenco ili absolute ne intencis enlasi nin en sian landon. Ni komencis fantazii kiel ni plej bone agus, se ni estus elĵetitaj. Post klarigoj de niaj gvidantoj, ke ni ne estas « krimuloj » la afero ordiĝis, kaj ricevante akran rigardon de la norvegaj oficistoj, ni rajtis daŭrigi al Narvik.

En tiu urbo ni pasigis duonan tagon. Dum ĉirkaŭ duhora ŝipekskurso sur la fjordo ni ĝuis la nepriskribeblan belan naturon. Sur apuda monto ni starigis ŝtonon je la memoro de la plej norda esperanto-klubo en la mondo, kun jena surskribaĵo:

ESPERANTO

Ankaŭ en ĉi tiu
mondangulo atingis kaj venkis
la helplingvo
inter la popoloj

Ce tiu soleno, reprezentanto de ĉiuj ĉeestanta nacio faris mallongan paroladon.

La rapida vizito en Narvik estis finita kaj post adiaŭo kaj danko al la afablaj norvegoj ni devis forlasi ilin kaj la belecon tie, kaj kontraŭ nia volo ni estis survoje suden. Iom post iom malaperis la montegoj, kaj la arbara naturo diris al ni, ke ni alproksimiĝis al pli sudaj lokoj. Nia plej lasta halto estis Porjus, kies grandan elektran energi-centrejon ni vizitis. Dek kilometrojn sude de Porjus troviĝas grandioza, belega akvofalo, nomata Harspranget. La sono de la muganta akvo estas aŭdebla en la tuta ĉirkaŭaĵo. Tre malfacile estis retiriĝi de tiu bela vidaĵo, sed la trajno kiel kutime atendis nin kaj... Unu semajnon post la forveturo ni ree proksimiĝis al Stokholmo kaj baldaŭ (tro baldaŭ!) venis la horo de la disigo. Ni volonte volus plilongigi la tempon, sed estis neeble...

Stokholmo... Fino!

ELSA THORNBURG.



Jean Forge, kvankam li ŝvitis por prezenti ĝustatempe la unuan esperanto-filmon, trovis tempon por troviĝi inter simpatiaj esperantistoj (fot. Stinger).

KERUAN! La sankta urbo! Konata en la tuta muzulmana mondo kaj eĉ pli fore; ekster tiu religia medio

Kaj prave! Nepriskribebla estas la impresoj, kiam post longa vojaĝo aŭtoĉare tra dezertaj kampoj, sur kiuj oni renkontas de tempo al tempo nur nomadojn kun siaj kameloj, azenoj, edzinoj kaj infanoj oni trapasas la monteton *Dra Tamar*, plenan de ĝardenoj kaj fruktoarbaretoj kaj subite oni malkovras, en la senfrukta senlimeco de la ebenaĵo, la Sanktan Urbon. La Sanktan Urbon, kiu fiere atendas vin. Ĉirkaŭita de altaj krenelitaj muroj, Keruan vidigas siajn elstarantajn kupolojn kaj minaretojn, kiuj konturas klare sur la fono de la purpuriginta ĉielo. Keruan estis fondita en la j. 671 p.K.; post dufoja bruligo ĝi estis rekonstruita en la j. 800 de emiro

Eliksiro de l'vivo! tiu eliksiro de l'vivo en kiu ni promenas nudpiede sur matoj estas surpriza antitezo de tiu movo inter la mortintaj historioj...

Ne, mi ne povas daŭrigi la priskribon de tiu Moskeo, de ĝiaj jemenaj fajancoj, de cedra ĉu platana katedro, de ajuraj paneloj, ĉiuj malsimilaj, dekoraciitaj per floraj motivoj aŭ geometriaj desegnoj — ĉu de ĝiaj aliaj luksaj ĉambroj kaj ĉambregoj ĉu de ĝiaj tomboj, inter kiuj troviĝas tiu de *Sidi Sahab Abu Gemaa El Balui*, akompaninto de la granda Profeto.

En Tunizio

EL-GEM

En Keruan, melankolie poezia, kiel ĉie, atendis nin festeno. *Si Mrabet*, kaido de Keruan, akceptas nin al mango en sia propra domo. Bongusta araba tagmango. Jam al kutimigitaj, kun vera ĝuo ni mangas: brekojn (2), kuskusojn (3) kaj meŝuon (4). Mi povus citi ankoraŭ kelkajn nomojn, sed mi timas, ke oni ne akuzu min pri neologismaj tendencoj...

Post tiu kaida akcepto ni admiris la keruanajn tapiŝojn, kiuj famaj estas en la mondo.

Mi konstatis, ke mi revenas al Keruan, eble sub la influo de la kolora vizio de ĝiaj foiroj. Pardonu, ni daŭrigu la duhoran vojaĝon por povi elvoki la tre impresan historian spektaklon: la majestatan kaj imponan amfiteatron de El-Djem (El Gem).

Imagu, ke sur dezerta sabla ebenaĵo vi ekvidas subite grandegan amfiteatron, kompareblan al tiu de Romo! Nur kelkaj malriĉaj kabanoj unuflanke de ĝi troviĝas, kio ankoraŭ plialtigas ĝian majestaton.

Amfiteatro, kiu povis enteni 60.000 spektaktantojn meze de dezerta tero!

Kie estas la urbo, kiu ĝin ĉirkaŭis? Kie la vivo, kiu iam ĉie tie pulsas?

Kie la riĉeco, kiu ĉi tie nestis en domoj kaj palacoj; kaj ankaŭ en la tero, kiu tiam estis certe fruktodona. La potenca urbo ne plu ekzistas: nenia postsigno, eĉ ne ruinoj!

Kaj tamen ĉi tie estis kronita la imperatoro Gardio en la 3-a jarcento p.K. Estas tamen ĉi tie, ke la fama berbera heroino Kahena kreis fortikaĵon, kiun ŝi defendis kontraŭ la invadoj de araboj en la 7-a jarcento...

Restis el tiu glora kaj riĉa historio nur la ankoraŭ bone konservita amfiteatro,

kiu estas la plej bela romana monumento en la Norda Afriko. Imagu ĝin: 148 m. longa kaj 122 m. larĝa, ĝi konsistas el tri serioj de arkadoj kaj ĝia alteco estas de 36 metroj.

Surpaŝinte la loĝion de la imperiestro rechas en niaj pensoj la krioj de la popolo kaj la muĝmuĝoj de la bestoj el antaŭ milcentoj da jaroj...

Noktigas. Ni devas perforti nian menson kaj penson por — reveni al la nuneco.

SFAX

Nokte, post aŭtoĉara veturado alveninte al *Sfax*, ni ne povis tuj rimarki la grandan kontraston inter la dezerta regiono de Keruan kaj El-Gem kaj la senmezura vastaj olivarbaroj kaj belaj ĝardenoj, kiuj ĉirkaŭas tiun urbon.

Nur matene, ni konstatis, ke tiu dua — laŭ graveco — urbo de Tunizio estas ĉirkaŭita de dek mil ĝardenoj kaj de sep milionoj da olivarboj.

Sfax estas granda urbo. Ĝi havas 120.000 loĝantojn, inter kiuj pli ol 100.000 formas la muzulmanojn indigenoj, da francoj estas 3.000 kaj la resto konsistas el italoj, grekoj, hispanoj, hebreoj kaj maltoj.

La eŭropa urbo estas tre moderna kun belaj, luksaj domoj laŭ karakteriza maŭra stilo. Tre larĝaj avenuoj kaj stratoj, grandaj placoj kaj urbĝardenoj.

La majesta Urbdomo kun tridek-metra alta minareto estas tre vidinda konstruaĵo. Ne nur pro sia arkitekturo, sed ankaŭ pro siaj internaj riĉaĵoj. Oni plibeligis ĝian internon per brilaj mozaikoj kaj per valora muzeo.

La araba urbo estas ankaŭ rimarkinda. Rimarkinda pro sia grandeco, pro siaj Granda Moskeo kaj moskeo de Buŝuŝa el oka jarcento, bonege konservitaj, kaj pro la pureco, kiu frapas.

Tie ĉi la unuan fojon ni havis la tempoj kaj grandan plezuron kontakti pli intime kun la indigenoj. Tio estis por ni ne nur plezuro, sed vera regalo kaj surprizo.

Dum kelkaj horoj mi promenis en la mallarĝaj stratoj de la araba urbo akompanita de la urba konsilanto s-ro *Ahmed M'hamed Essellami*, kiu afable donadis al mi klarigojn pri la araba vivo kaj kutimoj; kaj kiam ni ekparolis pri Eŭropo, mi konstatis kun vera plezuro, ke mia akompananto scias funde diversajn problemojn de la eŭropa politiko, ke li bonege konas diferencigi ekz. Gdynia de Danzig, unuverte, ke li estas pli klera pri la aferoj de Eŭropo, ol multaj kleraj eŭropanoj. Ĉu mi aldonu, ke la francan lingvon li posedas perfekte?

Tie ĉi la unuan fojon pli profunde mi pripensis la bonan kaj inteligentan influon de la franca kolonia laboro.

Penetrante la araban urbon mi konstatis grandan kontraston inter ĉi tiuj indigenoj kaj la indigenoj de la aliaj urboj, kiujn ni vizitis. La sfaxaj indigenoj estas vivaj kaj laboremaj. La juna generacio tre studema. La franca kaj eŭropa kulturo kaj civilizacio ĉi tien forte enpenetris.

Mi tuj aldonu, ke tiu eŭropanigo neniel ŝanĝis la familian vivon, kiu restis ĉiam patriarka kaj simpla. Neniaj luksaj elspezoj, nenia lukso en la vestado, escepte de religiaj festoj kaj ritaj ceremonioj.

La riĉeco de Sfax estas ĝia olivarbaro, kiu longiĝas en formo de ventumilo je pli ol okdek kilometroj.

Elveturante el la urbo ni trapasas unue la multajn ĝardenojn. Tia ĝardeno, ha-

(2) Breko: triangula pastaĵo enhavanta ŝajne ene haĉitan viandon, ovon k.t.p., iom similgusta al pasteĉo.

(3) Kuskuso estas araba speco de grilo. Kuskusajo estas mango konsistanta el tritika ĉu alispeca grilo, viando kaj diversspecaj spicaĵoj. Ĝi estas la nacie araba mango.

(4) Meŝuo oni nomas la rostadojn el tuta ŝafo, kiam oni servas dum la akceptofestoj.



OAZO GABES

Ibrahim el la Aglab kaj dum du jarcentoj Keruan havas brilan periodon.

La universitato de Keruan, la scienco de ĝiaj teologoj kaj medicinistoj estas fama en la tuta Islamujo.

Sed la indigena loĝantaro ĉiam revoluciiis kontraŭ la araba dominado.

Dum la hilaliana (1) invado la Sankta Urbo estis prirabita kaj plej parte detruita.

Tiun iaman prosperon kaj lukson ne plu retrovis tiu urbo. Bedaŭrinde ni eĉ ne plu retrovas la tiom multe prikantitajn palacojn kaj monumentojn de la kvartalo *Sabra*, kiuj iel malaperis en la 11-a jarcento.

Nenio restas el la palaco de Abassio nek el la rezidejoj de la famaj aglabitaj dinastioj. Sed ekzistas ĉi tie ankoraŭ multaj vidindaj monumentoj.

La Granda Moskeo estas jam ekstere grandioza konstruo, fama ĝi estas inter muzulmanoj de la tuta mondo.

Oni sentas strangan impreson, kiam oni trapasas la pordegon de tiu diejo, kie fremdulo-nemuzulmano rajtas neniam eniri. Ĉi tie estas escepto, ĉar «malpurigita» estis tiu moskeo. En la jaro 1881, dum la okupado de ĉi tiu regiono, franca rajdisto eniris la moskeon...

Kaj dank' al tiu akcidento ni povas viziti la Grandan Moskeon, kiu per sia originaleco kaj grandeco reprezentas ion unikan en la mondo.

Ĝi estis fondita en la jaro 669 de Sidi Okba, rekonstruita en la jaro 836 kaj pli-grandigita en al jaro 865.

Ni eniras korbate la grandegan kaj grandiozan korton, pavimitan per marmora kaj kiun dominas trapezoida minareto. Deksep pordoj kondukas al la Granda Ĉambrego, «la milkolono».

La ĝenerala aspekto estas romana de tiu muzulmana ejo. Okulo al kutimigita al antikvaj monumentoj ne trovas surprizon, sed tamen la impresoj fiksigas.


Oni estas mirigita, ke tiu mikso de ĉiaj artoj kaj de ĉiaj epokoj, kiu ĉi tie eniĝis povas doni simile belan, ravan harmonian tuton.

Jen fustoj diversformaj kaj diversgrandaj, diversaj kaj malsimilaj kolonoj, kiuj vidis diversajn tempojn kaj epokojn, plej diversaj kapiteloj: dorikaj, jonikaj, korintaj.

Cio kolektita kaj amasigita el diversaj kristanaj kaj nekristanaj, romanaj kaj paganaj monumentoj. Tiuj fustoj sur akrekontrastaj sokloj faras impreson de kokletoj.

Tiu fanatika popolo kreis al si Dio el ĉiuj miksaĵoj de ĉi tie antaŭe pasintaj kulturoj kaj civilizacioj monumenton, Grandan Moskeon. Ĝi impresas kiel eliksiro de l'vivo. Ĉar finfine — ĉu nia mondo ne estas ankoraŭ kvazaŭ eliksiro de l'vivo inter la nin ĉirkaŭantaj mortaj mondoj?...

(1) Hilalianoj: arabaj militistaj nomadoj, kiuj venis el Supra Egiptujo.



EN LA KORTO DE ARABA DOMO

Ne valoras priskribi, ĉar la priskribo ne povas redoni la veran vivan bildon, kiun la fotografaparato nur parte kaj neperfekte prezentetas.

Pri la aliaj moskeoj ne estas loko por paroli kiel ankaŭ pri la pitoreska, tute araba urbo.

..


Keruan, la sankta urbo! Keruan, kie ĉiu muzulmano volas esti enterigita, kaj kie ĉiun vendredon sur la ĝin ĉirkaŭantaj tombejoj ekregas la vivo: la amasoj da vizitantoj venas el ĉiuj partoj de l'lando por preĝi sur la tomboj de siaj familianoj.

Kurioza aspekto kiam vespere, inter la blankaj tomboj, kiujn de supre la luno rigardas, moviĝas la amaso. Oni resentas tiam la dolĉan melankolion kaj kaptas vin la mistera ĉarmo de la lando...

Kaj ripetatas tiam viaj lipoj la versojn de la araba poeto:

Tiu, kiu ĉi tie vivas estas feliĉa

Tiu, kiu ĉi tie mortas estas benala



AMFITEATRO DE EL-DJEM

Ni pripensu unu la alian

Dum la pasinta printempo, en la preĝejo Sankta-Ethelburga, nia atestimata londona samideanino, s-ino Margaret L. Blaise, faris emocian kaj pensoplenan predikon por kiu ŝi elektis, kiel tekstojn, vortojn de Sankta Johano el la Epistolo al la Hebreoj (ĉap. 10 v. 24):

« Kaj ni pripensu unu la alian, por instigi al amo kaj bonaj faroj; ne forlasante nian kunvenadon, kiel estas la kutimo de iuj, sed konsilante unu la alian. »

Plie el la Epistolo al la Koloseanoj (ĉap. 3 v. 15) kaj el la Libro de Jesaja (ĉap. 65 v. 25):

« La unuan « punkton » de tiu kortuŝa parolado ni publikigas ĉi-sube certaj, ke ĉiu el niaj legantoj, kiuj ajn estas lia kredo aŭ filozofio, ricevos suknplenajn fruktojn el tiuj altralaraj paĝoj.

•••

Ni pripensu do unu la alian.

Se nur ĉiu el ni, antaŭ ol agi, pripensus la aliajn, tiam, certe, neokazus la kruelaj, tiranaj, aŭ forgesoj de hodiaŭ. Se oni ĵuste taksas la nunan mondon, eble la plej frapanta karakterizaĵo estas la senpripensa kruelco. Kion ni vidas ĉie? Malgraŭ kortaŭaj opinioj, la ĵusta okulo, large serĉante, kaj klare observante, vidas amasmortigon de senkulpaj politikuloj; tendarkoncentrigon de senhelpaj ribeluloj; persekutadon de alirasanoj; limigojn aŭ nenigon de la eklezioj; malpermeson al libera verko aŭ parolado; kaj, ĉe en nia propra lando, malsatigon por la senlaboruloj.

Kaj tamen ĉio, tio ĉi estas malprava, malnobla, kaj eĉ al vera kristano, nebla.

Lastan monaton, post nia Ronda Kunveno, iu rondano petis min: « Ĉu ni ne povas esprimi bedaŭron kaj kompaton al Vienaj suferantoj? » Li aldonis, ke pro sia propra politika kredo, li mem ne volis esprimi la bedaŭron pro timo ofendi la aliajn rondanojn; kaj liaj vortoj pensigis min, ke eble, tro ofte, esperantistoj timas ofendi aliajn kaj, pro tio, tro malofte kuraĝas voĉi sian kompaton.

Do, tie ĉi, kaj nune, mi petas, ke el viaj kompatemaj koroj eliru preĝo al Dio, via Dio, kaj ilia Dio, ke la sufero baldaŭ ĉesu, kaj ke la ĝojo denove venu, en Vieno, kaj en ĉiuj landoj.

Kiam mi estis en Germanujo, mi vidis, kompreneble, multon, kio estis multe pli bona en la nuntempa vivado ol dum la unuaj postmilitaj jaroj; sed, ankaŭ, mi ne povis ne vidi multon, kio estis pli malbona; kaj la malĝojoj kaj suferadoj kuŝantaj en okuloj de bonaj pacemaj virinoj kaj viroj restis kun mi kaj altrudis sin al mi de tiam ĝis hodiaŭ.

La modesta, se fieri, humileco de la senlaboruloj, kiuj mi observas ĉutage en Londono kaj kiuj mi prilargas pri aliaj urboj kaj landoj; iliaj suferoj pro malsato, manko de vesto kaj de ĉiu simpla komfortaĵo; kaj, precipe, ilia sento pri nebezoniĝo; ĉio ĉi ne nur malĝajigas, sed eĉ kolerigas min, — ke en lando riĉa kiel la nia, saĝa kiel la nia, nobla kiel la nia, benita kiel la nia, oni tamen permesas tian staton. Kaj, fine, la senseco, blinda, kaj malnoblega persekutado de la judoj kaj de la nigruloj en preskaŭ ĉiu lando hodiaŭ rompas al mi la koron, kaj preskaŭ kredigas, ke la homoj tute frenezigas.

Se ni pripensas unu la alian, ni konstatoj tuj, ke ĉiu, tiu nia supozita malamiko estas vere (laŭ la diro de Kristo) nia frato, — simila laŭ osto, karno, koro kaj spirito. Kelkaj sopiras al libereco, kelkaj malsatas pro manko de pano, kaj kelkaj nur deziras nian amon aŭ komprenon. Jesuo ja ordonis, ke ni amu unu la alian, — sed amo ne devus esti nure sentimentala alpenso, ĝi devus esti vera instigo al helpo kaj servado.

Ni iom pripensu la politikulojn, Sajne, nia Kreinto mem amis la diversecon. Ni vidas ĝin ĉie en la naturo; estas milioj da floroj, arboj, herboj, bestoj, birdoj, homoj; sed neniu tute ĝuste similas unu la alian. Precipe ĉe la homoj la individueco regas; Johano ĉiam radikale diferencigas de sia frato Henriko, kaj Mario de sia fratino Sofio. Nature, do, estas, ke iu homo fariĝas konservativo, alia komunisto, tria liberalo, kaj kvara socialisto. Kompreneble, se la unua penus konservi nur tion, kio estas nepre konservinda; la dua komune dividus ĉion, kion li mem posedas; la tria liberele pritraktus ĉion kaj ĉiun renkontitan; kaj la kvara vere socialiste vivus kun najbaroj; tiam kredeble la klasbataladoj estus neblaj, kaj ĉiu fariĝus pli kristanema kaj tolerema. Sed oni ne tiele agas: Oni arogante portas siajn politikajn nomojn kaj uniformojn, kaj zorgas pli por la partio kaj la em-

blemo, ol por la kredo, kaj por la bono de la publiko.

Do, kion faru la kristana esperantisto? Certe, li unue penus kompreni la fraton, ĵuĝi senpartie, pripensi tolereme, kaj ĉi konscience. Li ĉiam amu la homon kiel fraton, eĉ se li ne povas konsenti la politikon; kaj, pleje, li ne kondamnu, amase, aliuojn, kiel krimulojn.

Ankaŭ ni pripensu la milionojn, kiuj nuntempe ne enspezas. Kion faru je tiuj la kristana esperantisto? Ni, unue, ne malsatu kaj ne malestimu ilin. Due, laŭeble, ni helpu ilin, per preĝo, per konsilo, per donaco, per instruado, per gvido, kaj, pleje per laboro kaj dungado, laŭeble. Ni tute ne admonu, senracie, ekzemple, ke virinoj ne faru la laboron de la viroj, aŭ ke edzinoj ne anstataŭu la edzojn kaj patrojn; aŭ, ke riĉuloj tute ne laboru. Ĉiu rajtas labori, tion ni tuj konfesu. Sed tiam, ni demandu nin, ĉu konscience ni mem povas akcepti salajron nebezoniĝan, aŭ labori pli longe kaj pli malfrue ol kutime por gajni propran krommonon, kiam aliaj, senlaboraj, plibezonantaj volonte nin anstataŭas por gajni sian simplan vivrimedon. Se nur kelkaj homoj ne estus tro prenemaj; se riĉuloj laborus nur filantropie, tiam estus laboro kaj mono por ĉiuj, eĉ en la nunaj krizaj tempoj.

Kaj nun ni pripensu la persekutatojn. Jesuo diris: « Feliciĝas tiuj, kiuj estas persekutitaj kaj riproĉitaj, ĉar ilia rekompenco estos granda en la ĉielo. » Kion granda, do, devas esti la malfeliĉo de la persekutantoj! En la hodiaŭa mondo, eble plej suferas pro persekutado la nigruloj kaj la judoj. Se ni ilin pripensas saĝe, racie, ĵuste, ni grade, se ne tuj, konstatas, ke, kiel ĉiam, efiko ne rezultas sen kaŭzo. En landoj kiel Ameriko, la senkulpaj negroj rajte povas protesti, ke ne ili mem sin kaptis, brute traktis, kaj ŝiptransportis al fremda lando; ke se ekzistas tiel kruele nuntempe la kolordomando en lia adoptland, ili mem ne tion kaŭzis, nek deziris; sed, ke la blankuloj nun nur rikoltas tion, kion ili mem, en la pasinteco, tiel sovaĝe semis. Dum jarcentoj la sango de la sklavoj ĉiutaga kriegis al la kompatema Dio, kaj grandega, do, devus esti ilia iama rekompenco; grandega, ankaŭ, la pento de tiranaj mastroj.

Eĉ pli senracia, ĉar malpli natura estas la persekutado al la judoj. Sajnas, ofte, ke malgraŭ la supra nobligo kaŭzita de la civilizacio, sube kuŝas la senpripensa kruelco de la primitiva sovaĝulo. Tiu kruelco povas sin montri per ĉasado de senhelpa besto, per tiraneco al senkulpa infano, aŭ per malsato kaj malestimo al iu homo. Oni eble povas protesti, ke foje la judoj meritis punon pro tio aŭ alia ofendo, pro monamo, pro ŝvitiga laboro aŭ pro trompoj diversaj. Sed ĉu neniu el ni ankaŭ tiel ofendas, eĉ ofte ofendegas? Ĉu ne nia propra agado maldistingas kaj nia persekutado al ili ankaŭ ne puŝas kaj devigas kelkajn homojn al subaj agoj, kaj al la troa monamo. Certe, jes, kaj prefere ol tute kondamni alian tutan rason, la kristana esperantisto pripensu la grandajn homojn, kiuj venis el la Sanktaj Landoj. De Moseo al Davido, de Davido al Kristo, kaj de Kristo al Zamenhof estas ja la judoj, kiuj ofte instruis, pilriĉigis kaj benis la mondon. Neniam ni forgesu, ke Nia Sinjoro, Jesuo-Kristo, naskiĝis en la Oriento, instruis en Jerusalemo, kaj, estante judo, amis, ne nur la tutan homaron, sed, precipe, amis sian propran rason. Ne nur kristanoj, sed preskaŭ ĉiu en la mondo ŝuldas multegon al la influo de tiu grandioza instruanto kaj reĝo, Jesuo-Kristo. La Sankta Biblio mem estas ja donaco de la judoj.

Kaj se ni deziras pli lasttempajn ekzemplojn, ĉu ni ne povus trovi pli elstarantajn ol tiuj tri Zamenhofaj fratoj, kiujn ni ĉiuj konsis kaj amis. Ĉiuj tri vivis, laboris kaj mortis amante kaj instruante la homaron. Ludoviko inventis kaj donacis sian mirindan lingvon, elspezis monon kaj tempon por malriĉaj okul-suferantoj, kaj pasigis siajn lastajn horojn verkante librojn por nobligi kaj inspiri la homaron. Felikso laboris medicine, esperantiste, kaj precipe por la georĝoj; Leono kuraciste, verkiste, scienciste, pacifiste laboris ĉiam, kaj ankaŭ multe por la surdmutuloj. Ĉiu tro laboris, ĉiu sin forgesis, ĉiu pro superlativa amo al aliaj homoj tro frue mortis. Ĉu, do, kristana esperantisto povas persekuti anojn de tiu raso, tiel granda, kaj antikva, kiel ankaŭ moderna? Neniam ni forgesu la Kristajn vortojn: « Tion, kion vi faris al la plej malgranda el tiuj, vi ja faris al mi. »

Kaj, fine, la pripensado iru el niaj koroj al tiuj, kiuj, eĉ de la Krista vidpunkto vere ofendas, — kaj, tiam, ni preskaŭ ĉiam trovos, ke eĉ ĉe ili, la Krista pardo-

La spirito en la Morgaŭon (Frank Crane)

Dum iu nokto forbrulis la laborejoj de Thomas Alva Edison, kio kaŭzis la perdon de kelkaj milionoj da dolaroj. Edison estis tiam 67-jara.

Ankoraŭ en la sama nokto li estis demandita pri sia malfeliĉo.

« Mi nun tute ne pensas pri ĉi tiu afero! » diris la maljuna inventisto. « Mi pensas pri tio, kion mi faros morgaŭ! »

Tio estas la spirito de la granda plenumanto. La spirito en la morgaŭon.

La spirito de la malsukceso estas la spirito en la hieraŭon.

Kien estas direktata via vizaĝo?

Se vi rigardas en la eslatecon, poste vi vivas en la sunlumo. Ĉar la suno lumos nur por homoj de morgaŭ.

Se vi rigardas en la estintecon, poste vi vivas en dubo kaj malvarmo kaj nebulo. Ĉar tiuj hieraŭuloj ĉiam estas iom malĝojaj.

Edison, la inventisto, faris multon da bono por la homaro. Edison, la homo, al ni ĉiuj impresigis ankaŭ servis per tio, ke li montris al ni la spiriton en la morgaŭon. Ĉar la morgaŭo estas granda en promesoj, forta en moviga forto kaj riĉa en elementoj de la feliĉo.

F. W. V.

NEKROLOGO

La 27-an de aŭgusto mortis d-ro Adolfo Bishitzky, meritplena kaj sindona honorezidanto de la esperanto-societo Verda Stelo en Praha.

Tre amata kaj konata kirurgiisto, li estis ĉiam preta helpi al malfeliĉuloj kaj malriĉuloj.

Sindona kaj bonkora li restos neforgebla en la rememoro de tiuj, kiuj alproksimiĝis lin kaj kiuj konsis lin persone.

En la ĉeĥoslovaka esperanto-movado li ludis gravan rolon. Estimata kaj respektata li multe helpis al nia movado en la propagando.

Li postlasas kelkajn bonajn tradukojn de Hebel kaj Goethe.

Idealisto kaj pacifisto li apartenis al diversaj homartendencaj societoj, kie aktive li kunlaboris.

Oferema li kontribuis ofte al aperigado de la Internacia Medicina Revuo kaj al la propagando en la medicinaj rondoj.

Al lia estimata edzino kaj funebra familio, al la esperanto-unuigo Verda Stelo kaj al la ĉeĥoslovaka esperantistaro ni esprimas nian konsenton.

Bonvolu Korekti

La antaŭlastan alineon en la kongresraporto de nia ĉefredaktoro bonvolu jene legi:

« Allogas min via kompreno de vivo. Vi sciis krei al vi altan kulturon kaj alfari al ĝi la civilizan progreson kaj teknikon, kiujn vi saĝe regas kaj uzas. »

nemo elserĉas kaŭzojn kaj motivojn, kaj tiam pardoros. Se tiranoj levigas, se popoloj ribelas, se nacioj volas sin venĝi, ni konstato ankaŭ, ke, plej ofte la kaŭzo de ĉio ĉi kuŝas en la pasinteco; kaj ni tiam diru Kriste: « Patro, ilin pardonu, ĉar ili ne komprenis kion ili faras. »

S. Paŭlo diris: « Pripensu la aliajn por instigi al amo kaj bonaj faroj. » Alivorte, por elvoki amon kaj bonon. Do, nia pripensado devigas nin agi ĉiam ame kaj bone. Eĉ la plej malgranda rideto, se ĝi estas varmekora, povas helpi al nia najbaro; sed ni ĉiuj ja povas kaj devas fari multon pli ol tion. Neniam en la mondhistorio prezentis sin al homoj tiom da oportunaj okazoj elvoki amon kaj fari bonon. Ni, do, ilin kaptu.

MARGARET L. BLAISE.

Kuracista Angulo Kontraŭ la moskitoj

I. — *Kiaj fiŝoj mangas la moskittlarvojn?*

En antaŭa artikolo pri paludismo mi diris, ke por malplimulti la moskitojn en marĉoj, sufiĉas meti en ilin fiŝojn kapablajn detrui la moskittlarvojn.

Por utili al la legantoj, kiuj suferas pro ĉeestado de multegaj moskitoj — ĉu ili loĝas en regiono paludisma aŭ nepaludisma — mi sciigos hodiaŭ kiajn fiŝojn oni devas enmeti en la marĉojn aŭ akvujojn por faciligi la detruon de la moskittlarvoj.

Pri tiu temo oni trovas tre interesajn detalojn en la ĵus eldonita tezo de d-rino Roule, titolita « La rolo de la larmangantaj fiŝoj en la profilakso de la paludismo ».

Por ke fiŝoj taŭgu por la detruo de la larvoj ili devas esti:

1° Malgrandaj, ĉar la grandaj fiŝoj ne ŝatas tian mangadon. Ekz. la anĝiloj mangas la moskittlarvojn, nur kiam ili estas tute junaj;

2° Multnombraj; pro tio oni devas elekti viviparajn fiŝojn, ĉar ili multe pli rapide multiĝas ol la oviparaj;

3° Fortikaj, rezistemaj al ĉiuj temperaturoj;

4° Mangegemaj, por mangi multe da larvoj;

5° Nemultekostaj.

La plej konvena fiŝo nune estas amerika fiŝeto, kiun oni nomas « Gambusia affinis ». Ĝi estas verda diafana fiŝo kun larĝa kapeto kaj firmaj dentoj. Tra la teksaĵoj oni povas vidi ĝiajn internajn organojn sub formo de nigraj makuletoj. La longeco de la plenkreskuloj varias de 2 ĝis 2 1/2 cm; ilia pezo varias de 0,160 ĝis 1 gr.

La gambusioj povas vivi en ĉiuj sufiĉe trankvilaj akvoj, eĉ se tiuj ĉi entenas malmulte da natria klorido; tamen la akvujoj faritaj de cemento ne favoras al ilia multiĝo.

Se la moskitoj estas tre multnombraj, ĉefe se ekzistas paludismo, oni devas meti 5.000 ĝis 10.000 fiŝidojn por ĉiu akvosurfaco diametre kvinmetra.

La meto de fiŝoj en marĉojn, kvankam ĝi estas unu el la bonaj rimedoj kontraŭ la moskitoj, tamen uzata sola ne sufiĉas.

II. — *Kontraŭ la moskittpikoj.*

Legantino de Nia Gazeto, tre sentema al la moskittpikoj, petis de mi konsilojn por antaŭmalhelpi al la kaŭzataj de ili perturboj, t.e. prurito, haŭt-ŝveligo, ktp. Jen kelkaj rimedoj:

Trempi alumeton, aŭ ian lignopeleton, en unu el jenajn solvaĵojn:

ĉu	Jodo.....	4 grm.
	Acetono.....	15 "
ĉu	Formolo je 40 %...	15 grm.
	Ksilolo.....	5 "
	Acetono.....	4 "
	Kanada balzamo...	1 "
ĉu	Kloral-hidrato.....	5 grm.
	Kamforo.....	5 "

kaj per ĝi tuŝi la pikaperturon, ne la ĉirkaŭaĵon.

La tria likvaĵo supre menciita estas ankaŭ tre efika okaze de pikoj faritaj de vespo aŭ abelo.

Kontraŭ la moskittpikoj oni povas konsili ankaŭ froletadon de la regiono per vatpeco sorbigitaj per iom da:

Metilsalicilato	0,50 grm.
Timolo	1 "
Acetata acido.....	10 "

Alkoholo je 60 % sufiĉa kvanto por fari 125 kem da solvaĵo.

D-ro BRIQUET.

AFORISMOJ

Ni povus havi altan kulturon, sed mankas la unua neceso por ĝi: kulturaj homoj.

La homoj ne demandas: Kia estas ĉi tiu? Ili asertas simple: Tia li estas. Kaj pli multe ili ne volas eksci.

Neniu povas esti malsuprentirata de la vivo, se laŭdestine li ne troviĝas jam malsupre.

A.-E. CORTINAS.

Tra la Gazetaro

THE BRITISH ESPERANTIST en sia n-ro de septembro publikigas raporton de Goldsmith pri la Kongreso en Stokholmo. S-ro G. rekomendas legi la raportojn de Heroldo de Esperanto kaj Esperanto. Ĉu li opinias, ke la raportoj en la aliaj gazetoj ne estas legindaj? Aŭ ĉu s-ro Goldsmith, la animo de la Brita Esperanto-Asocio aŭdis nur pri tiuj du gazetoj? Aŭ ĉu s-ro Goldsmith antaŭdivenis, ke nur tiuj du gazetoj povos havi bonajn raportojn? Aŭ ĉu s-ro Goldsmith deziras, ke la membroj de B.E.A. ne legu aliajn gazetojn? Aŭ ĉu s-ro Goldsmith opinias, ke...

Sed sufiĉas la aŭdo!...

HEROLDUS DE ESPERANTO en sia numero de la 29-a de julio diras, ke «s-ro Jung estas hodiaŭ la sama kiel «sistempe» Ni de ĉiam (kaj ĝis hodiaŭ) tre ŝatas la internan ideon; ni nur malakceptas, ke ĝi devas esti nepre apartenaĵo de esperanto. Ni, kontraŭe, asertas, ke ĝi neniam estis (nek estas hodiaŭ) ideo interna de esperanto, sed apuda, tamen tute bela kaj akceptinda».

Kun plezuro ni citas la frazojn de Heroldo, kvankam ni opinias, ke la interna ideo ne estas disigebla de esperanto.

Rilate al nia sendependeco ni neniel ŝanĝis nian opinion. Kiam temas pri relativeco, ĝi ankaŭ ĉiam ekzistas.

Kaj se temas pri la plej bela sendependeco, kiu laŭ Heroldo estas tiam, kiam oni «laŭeble faras ĝin sendependa de siaj propraj antaŭjuĝoj» — tiam oni certe ne publikigas artikolojn, kiuj laŭdas regimonojn pro ĝiaj murdoj, sed inter siaj propraj amikoj kaj kiu sovaĝe persekutas kaj atakas aliajn civitanojn pro la sola «eraro», ke ili apartenas — laŭdire — al alia raso.

Unuflanke ŝati la internan ideon kaj aliflanke laŭdi tiajn misagojn nek ritmas nek rimas.

LABORISTA ESPERANTISTO de 8 septembro estas propaganda numero eldonita en 10.000 ekzempleroj nur en nederlanda lingvo.

Pri BELGA ESPERANTISTO (septembro) ni pluefoje parolis simpatie kaj ni miris, ke ĝi ne bonvolis ĝis nun trovi loketon por citi kaj informi la ekziston de Nia Gazeto, kvankam ni regule ĝin sendadas.

Kaj nun en sia septembro numero «Belga Esperantisto» publikigas alvokon de s-ro Bastien el Nia Gazeto kaj «forĝegas» citi el kie ĝi ĉerpis ĝin. Tion ni povas postuli kaj esperi. Ni estas mirigitaj pro tia konduto, ĝuste, kiam ni scias, ke redaktas gazeton s-ro M. Jaumotte, laŭ jarlibro de U.E.A. profesia jurnalistoj.

Ni esperas, ke Belga Esperantisto bonvolos trovi loketon en sia plej proksima n-ro por afable noti, ke el Nia Gazeto ĝi ĉerpis la alvokon de s-ro Bastien, eĉ se ĝi ne trovas lokon por receuzi nian organon. Kaj tion ni demandas publike.

BONA LIBRO ESTAS BONA AMIKO: sub tia titolo konata libro-eldonejo Tokio-Do (Esperanto-fako), Kudan-ŝita, Kojimaĉi, Tokio aperigas monatan 4-paĝan bulletonon, en kiu ĝi anoncas la novaperantajn esperanto-librojn.

BULTENO DE LA TONKINA ESPERANTISTA GRUPO (Poŝtkesto N° 71, Hanoi) (junio), redaktata en franca kaj esperanta lingvoj montras, ke vigla movado kreiĝas en Hindoĉinio.

INTERNACIA POLICA BULTENO (Strasbourg-Meineau, 10, rue Engelhardt, Francujo) (majo-junio). La Internacia Polica Ligo havas bone redaktitan gazeton, kiun oni povas plej varme rekomendi al la policaĵo rondoj.

El INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO ni ekscias pri la malfacila kaj pena situacio de TAGE, kiu nun apenaŭ havas 300 membrojn. Ni admiras la fervoron kaj sindonon de la nederlandaj TAGE-anoj, kiuj klopodas savi la asocion de pere. Sukceson!

SENNACIEGA REVUO (19 julio) estas ĉiam interesa kaj kun varia artikolaro. Redaktata ame kaj inteligente ĝi apartenas al unu el la plej bonaj kaj seriozaj esperantaj organoj.

En SENNACIULO (25 julio) ni legis kun atento la raportaron de la Plenum-Komitato de SAT por la jaroj 1933-1934.

Kun vera gojo kaj simpatio ni ekscias, ke SAT scipovis venki ĉiujn malfacilojn kaj ke ĝia vivo estas certigita spite la multaj batoj, kiujn tiu organizo ricevis en la lasta jaro.

Ni deziras al tiu grava laborista organizo multan prosperon!

En POLA ESPERANTISTO (aŭgusto-septembro) ni trovas en «Lingva Angulo» respondojn al nia artikolo en n-ro 5 pri la papaj lingvaj rimarkoj de s-ro vienano. La nuna tono de s-ro Leono Vienano estas feliĉe jam malpli papa. Ni ankaŭ respondos, kiam ni trovas liberan momenton, al la malĝusta opinio de s-ro Varsovio.

POLA ESPERANTISTO trovis fine loketon por aperigi recenzon pri nia ekzisto. Ni dan-

Tra la libroj

Librojn duckzemplere ricevajn ni recenzas aŭ mencias; librojn unuckzemplere ricevajn ni nur mencias.

GOSTA BERLING, de Selma Lagerlof, tradukita de Stellan Engholm, ilustrita de Einar Nerman. 552+16 paĝoj. Formato 14-20 cm. Prezo, broŝurita sved.kr. 6.; bindita, 7,50 (Eldonis Eld. Soc. Esperanto, Stockholm, 1934).

La granda sveda poetino kaj verkistino Selma Lagerlof, nobelpremiitino, jam estas konata al la tutmonda esperantopubliko per kelkaj el siaj pli malgrandaj verkoj, eldonitaj de la sama eldonejo. Nun prezentigas ŝia unua ĉefverko, per kiu ŝi gajnis sian mondfamono.

En Gosta Berling la aŭtorino majstre pentras ne nur la vivon de la bela sveda provinco Vermlando kaj la tieajn bravajn, harditajn homojn, sed ŝi montras, kiel en ĉiu homo, eĉ la plej simpla, malriĉa kaj mizera, estas troveblaj bono kaj eĉ heroeco, oferemo kaj amo. La heroo de la libro estas geniuo, bonkora sed malforta kaj ŝanĝema laŭ karaktero. En sia verko Selma Lagerlof ne nur analizas la profundojn de la homaj animoj sed ŝi montras per klaraj kaj vivoplenaj bildoj la brilan vivon sur la Vermlandaj bienoj kaj ankaŭ la dolĉan iom mistikigan naturon de Vermlando, kie vivis multego da legendoj.

La tradukon lerte faris la konata verkisto Stellan Engholm. La tre persona kaj poeziplena stilo de la aŭtorino donis al la tradukinto sufiĉe malfacilan taskon, sed li bone sciis konservi la vivon kaj la ĉarmon de la verko. Tamen troviĝas kelkaj neatenditajoj, ekz.: «La belan Ornelou nomis lin tiuj junaj knabinoj, kiuj povis mortige malpacigi por danco kun li...» «Fraŭlino Faber el-kaj eniras la ĉambron». Tutpaĝaj (aŭ preskaŭ...) bildoj de Einar Nerman akompanas la tekston kaj ne ĝenas la leganton. La materia prezento de la verko estas bela kaj inda de la aŭtorino, de la tradukinto kaj de la eldona societo. — G.A.

LA VIVO DE NIA SINJORO JESUO, de Charles Dickens, tradukita de M. C. Butler. 118 paĝoj, formato 17x23 cm. 9 tutpaĝaj ilustraĵoj laŭ klasikaj pentraĵoj. Prezo, 6 ŝilingoj plus 6 pencoj por afranko (Eldonis Esperanto Publishing Company Ltd., 1934).

La mondfama brita verkisto, Charles Dickens skribis por siaj infanoj tiun historion, kiu, longe konservita manuskripto, aperis en la originala angla teksto dum la monato marto de 1934. La esperanta eldono sekvis sen longa prokrasto kaj, laŭ bibliografia vidpunkto, la nuna verko estas aktualajo. Ni tuj aldonu, ke laŭ la sama vidpunkto, ĝi estas nekontestebla valorajo. Kompostita per eleganta, granda, facile legebla litertiparo, ĝi estas plejzorge presita sur tre bona papero kaj ŝirmata per fortika plentola bindaĵo. Ĝi konsistigas du bibliotekan ornamon kaj ankaŭ donacon, kiun alte taksos la ricevantoj.

Sajnas al mi, ke la enhavon oni ne bezonas resumi. Sufiĉas, ke ni diru, ke la emocio, ĉiam pripensiga vivo de Jesuo estas rakontita de Charles Dickens sen vantaj stil-delikataĵoj, sed laŭ simpla, rekta maniero, tamen ne mankavanta literaturan karakteron, eĉ tiun plej altan, kiu nestas ne en nekutimaj vortoj aŭ kurioze kunplektitaj frazoj, sed en la senŝanceliga marŝo de la rakonto, en la ĝusteco kaj la sincero de la esprimoj. Videbla Dickens celis konformigi sian stilon al la biblia kaj tiel bone sukcesis, ke kiam en kelkaj partoj de la verko li simple citas la tekston el la Biblio, tiam tiu lasta harmonie lokiĝas inter la aŭtoraj paraĝaĵoj.

La traduko de M.C. Butler estas laŭsupoze bonega, same flua kaj simpla kiel la originalo. Oni senhezite povas rekomendi tiun libron al la legantoj, kiujn ne timigas la instruo nek la ekzemplo de la surtera vivo de Jesuo. — G. A.

ROMANO PRI AFRIKA BIENO, de Olive Schreiner, tradukita de Stephen A. Andrew. 270 paĝoj, formato 18,5x12,5 cm. Prezo: bindita, 6 ŝilingoj; broŝurita, 4 ŝilingoj + 6 pencoj por afranko, Mendebla de Brita Esperantista Asocio, 142 High Holborn, London W.C. 1. (Eldonis The Esperanto Publishing Company Ltd., 1934).

El la antaŭparolo de tiu verko ni ĉerpas jenon:

«Olive Schreiner, konata kiel la plej fama verkistino de Sud-Afriko, naskiĝis en 1855 ĉe la Wittemberga Misia Stacio apud la nord-orienta bordo de la tre vasta ebenaĵo nomita la Karoo (Karoo) lokita proksimume 700 mej-

kas eĉ pro la malfruo, ĉar eble ĝuste por tio, la recenzinto (ĉu?) povis skribi tiom afabliajn kaj eĉ flatajn vortojn.

DANSK ESPERANTO-BLAD (aŭgusto), parolas multe pri sia dumsomera laborado, pri la okazintaj kursoj ktp. La movado vigligas.

lojn for de Kapstado (Capetown), nun la legodona ĉefurbo de la Unio de Sud-Afriko, kaj 500 mejlojn de la loko kie nun staras la kvardek-kvinjara urbego Johannesburg, kiu ŝuldas sian ekziston al la plej grandaj orminejoj en la mondo. En tiu tempo ŝia patro, Gottlob Schreiner (kiu naskiĝis apud Stuttgart, Germanujo, kaj poste edziĝis kun anglino el Londono), laboradis ĉe Wittemberg. La Basela Misia Societo sendis lin tien kiel misiiston inter la indigenaj negraj gentoj, kiuj tiutempe ankoraŭ estis plejparte sovaĝuloj. Estas do facile kompreni, ke la cirkonstancoj sub kiuj naskiĝis nia aŭtorino, kaj la postaj ĉirkaŭaj influoj (ekster tiuj de ŝia familio), ne povis multe kontribui al ŝia ĝenerala eduko kaj klerigo. Pasiginte iom da tempo ĉe privata lernejo en apuda vilaĝeto, kiam ĉirkaŭ dek-okjara Olive Schreiner komencis laborenspezi kiel guvernistino ĉe «bura» familio sur farmbieno en la Karoo, cent mejlojn for de la misia stacio. Tie, ekster deĵorhoroj, kaj malgraŭ konstanta malsanemo, antaŭ ol ŝi estis plenaĝa, ŝi verkis la plej grandan parton de sia mondfama romano: The Story of an Afrika Farm — «Romano pri Afrika Bieno».

Per tio oni nun scias, ke en la priparolita verko senafekta virino pritraktas ĝuste tion, kion ŝi ja konas, ĉu ĝin spertinte mem, ĉu ĝin eksciinte kiel alestantino. Sekve la libro — eĉ se ĝi ne valoras pro la eksterordinare vigla kaj riĉa «interna vivo» de la verkistino — valoras multe pro la observitaj scenoj el la vivo en tiu mondangulo; pro la intima, ege sentema priskribo de la lokoj, best-kaj homloĝejoj; pro, fine, la viva «kompono» de la enrakontaj personoj (precipe la geknaboj) en unuĵn el kiuj la aŭtorino enblovigis iom da sia animo, da ŝiaj sentoj, da sia melankolia kompato, da ŝiaj sopiroj kaj esperoj, surteraj kaj alĉielaj. La verko, samtempe forta kaj dolĉa, akra kaj homa staras inter la ĉefverkoj pri kiuj la homaro rajtas fieri kaj per kiuj ĝi povas sin perfektigi.

La traduko estas ĝenerale bona krom kelkaj, ne multaj, strangaĵoj, ekz.: kolonulaj, stifa, preter la altaĵo kreskas...; ankaŭ kelkaj malmultaj preseraroj estas troveblaj, sed ili tute ne ĝenas. Resume, interese, kvankam neprivola legaĵo. — G. A.

RAKONTOJ POR GEKNABOJ, de Italo Toscani, tradukita de R. Castagnino. 188 paĝoj, formato 19x13. Prezo, it. L. 4 (Eldonis A. Paoles, S. Vito al Tagliamento).

Interesaj, fluaj rakontoj, efektive por geknaboj, tamen ne tiom infanecaj, kiom oni povus antaŭpensi. La esperanto-traduko estas laŭfundamenta kaj tre bone povas utili en la esperanto-kursoj kaj ankaŭ kiel unua legaĵo por la komencantoj, kiuj lernas solaj la lingvon.

MIA VOGAGO EN SOVETIO, de Antoni Słonimski, tradukita de S. Grenkamp-Kornfeld. 144 paĝoj, formato 13x20 cm, klišita kovrilo. Prezo, broŝurita svfr. 2,70; plus 10 % por sendkostoj. La kvina libro de AELA por 1934 (Eldonis Literatura Mondo, Budapest IX, Mester ucca 53).

IGI-IGI, serio de tri poŝtkartoj klarigantaj per bildoj la uzon de tiuj sufiksoj. Bona instruilo. Prezo de la serio, gmk 0,15 aŭ 1 internacia respondkupono afrankite. (Eldonis C. Walter, Graf Speestr. 24, Berlin, W. 35, 1934).

FRANZENSBAD GVIDLIBRO. — Recenzante tiun plaĉan gvidlibron ni erare atribuis ĝian esperantigon al fino Sofio Ciperu, kiu estas nur ĝia okaza dissendinto. La aŭtoro de la kompilo kaj traduko estas nekonata (de ni) esperantisto al kiu ni direktas la laŭdojn kiujn li meritas.

La XIV-a Sat-Kongreso

La 14-a Kongreso de SAT okazis de 3-8 aŭg. en Valencio (Hispanio) kaj fariĝis brila sukceso por la laborista esperantomovado kaj la ideo de la mondlingvo. 376 partoprenantoj el 13 landoj atestis pri la vivoforto kaj la praktika laboro de SAT. La laborkunsidojn enkadrigis belaj eksteraj aranĝoj. La solena malfermo okazis antaŭ 1.000 personoj en la Universitato, kun muziko kaj paroladoj de multnombraj reprezentantoj.

La urbestro akceptis solene la kongresanojn en la urbdomo. Srata tabulo estis inaŭgurata je la nomo de D-ro Zamenhof, en ĉeesto de la urbestro. Muzika kaj literatura vespero kunigis multnombrajn publikon.

Okaze de la Foiraj festoj kun artfajraĵoj kaj la fama Valencia Florbatalo, kiujn ĉeestis la kongresanoj, la propagando por Esperanto estis trege efika.

KORESPONDADO

Unu anonco ĝis kvin linioj kostas 2,50 frfk Ĉiu plia linio, 1 frfk.

Mallongigoj: L = leteroj, PK = poŝtkartoj, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, ES = esperantaj sigelmajloj, EG = esperantaj gazetoj.

AGAPO estas amika rondo en Parizo sen prezidanto kaj sen kotizo, kie oni parolas esperante pri ĉio krom politiko kaj kie oni ĉiam invitas simpatian propagandiston. Ĝiaj tagmanĝoj okazas ĉiutage je la 12-a en Restoracio Chartier, unua etaĝo, 124, Boulevard de la Chapelle, apud stacio Barbès-Rochechouart.

S-RO DRONCHAT, del. de UEA pri ĝeneralfaj informoj, 68 rue d'Alsace, Parizo - XIV. Francujo, petas el ĉiuj landoj sciigojn pri ĉiuj leĝtekstoj permesantaj al iuj ne militservi kondiĉe, ke ili konsentas utili alimaniere en stataj civilaj oficoj. Li supozas, ke tia kondiĉo eble ekzistas en Svedujo, Norvegujo, Danlando, Nederlando kaj Finnlando.

VOLAS KORESPONDI kaj intersaĝi PM kun filatelistoj alilandaj, J. Ebben, poŝtfako 2, Cuyk, Nederlando.

S-RO H.F. BREUKER, Schingen Bij Dronrijp, Friesland, Nederlando, dez. kor. kun geespistoj en la landoj: Aĉoroj, Albanujo, Borneo, Ĉilo, Ebur Marbordo, Greklando, Gvineo Hispana, Ĥinujo, Hindujo, Honduraso, Hind-Ĥinujo, Irako, Kolombio, Kongolando, Manĉurio, Sud-Afriko, Turkujo. Petas afranki kaj mem afrankos per multaj malaltvaloraĵoj P.M. Nepre respondos.

RADIO-INGENIERO L. TREGUBENKO, Poŝtkesto N° 1, Leningrad-3, U.S.S.R. deziras ricevi en ĉiu ajn lingvo librojn, jurnalojn (novajn kaj malnovajn), katalogojn pri gramofonoj (elektraj kaj akustikaj) kaj gramofonajn aparataĵoj. Rekompence li sendas librojn, PM, jurnalojn, ktp. laŭ deziro. Respondo garantiata.

SAMIDEANOJ EL LA TUTA MONDO, kiu el vi, kontraŭ esperantlingvaj, aŭ ukrainlingvaj eldonaĵoj el Sovetio povas sendi nur rekomendite jenajn librojn: 1. Bianchini, Cursum Completum Esperanti; 2. Benson, Universal Esperanto-Metodo, kaj 3. Enciklopedio de Esperanto, partoj I - II - ktp. Mi bone rekompencos! Proponoj sendu al Petro Surjanenko, Valki Harkovska Oblast, Ukrainio, U.S.S.R.

REDAKCIA KESTO

VERDSTELA FRATARO, Zwittau, Margareten 47 Ĉeĥoslovakio deziras korespondadon, intersaĝon de poŝtkartoj, vidajkartoj, gazetoj esperantistaj, poŝtmarkoj, k.t.p. Certaj respondoj!

S-ro S-ki, (Bulgarujo). — Via raporto pri la Bulgara Kongreso venas malfrue, krome vi skribas kraĵojn, kio malbonigas niajn okulojn. Ni ne povas doni tian manuskripton al linotipisto, kiu postulus (tute prava) samtempe de ni monon por la okultracado.

S-ro I.S. — Jes, vi estas prava, krom la Esperantista Akademio, kaj la Libera Akademio ekzistas ankoraŭ Helena Esperanto-Akademio. Vi povas tute bone krei Fuŝistan Akademion, Saŭcon!

Hungaro. — Kun plezuro mi akceptos viajn lirikaĵojn, poemojn ktp. Koran dankon por viaj komplimentoj!

Al multaj. — Nepre skribu klare, sur unu flanko de la papero, kun larĝaj liberaj margenoj. La malklare kaj kraĵoj skribitajn manuskriptojn ni ĵetas en paperkorbon. Ne tro pezigu ĝin, ni petas!

S-ro H.G. — Vi sendas al ni susteronaĵojn el «Lingvo Libro», faritajn eĉ de fama G. Karczag, por ilin publikigi? Ne, tion ni ne faras, Ni lasas al aliaj tian amuzon!

P.B. — Sendadu unue klare skribitajn manuskriptojn, ne ŝparu tiom la paperon, kvazaŭ vi sidus en lando, kie paperfolio kostas milionojn! Estas neeble legi kaj ankaŭ neeble doni al niaj linotipistoj! Fariĝu malŝparema, per tio vi helpas forigi la krizon! Amikan saluton!

Imprimé par la Société A^{me} L'Eclaireur de Nice et du Sud-Est

Le Directeur-Gérant: GEORGES AVRIL

